

EL POPOLO CINIO

中國新道

4

2000

ISSN 0032 - 4361

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esp.

ŷ-19034/2000

Bela kaj riĉa Taiwan

Retrospektive al la 10-a jarcento

★ POPOLA ĈINIO



Alpistoj sur la
plej altaj
montpintoj de
la sep
kontinentoj **21**



Lernejo sur
ŝipoj **34**



Bela kaj
riĉa
Taiwan

Geknaboj sin
ekzercantaj per
akrobataĵoj **17**



28



24

Ĝino-aj
vestoj



- 3 **INTER NI**
4 Retrospektive al la 10-a jarcento
7 **TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:**
Historio de Taiwan
8 Marŝo sur rulseĝo
10 **ĈINAJ E-ISTOJ:**
Mia revo ĉe la sojlo de la 21-a jarcento
12 **ORIGINALE VERKITAJ:**
Freneza rakonto
13 **KORESPONDI DEZIRAS**
14 **50 JAROJ — EPĈ:**
Propra opinio pri la internacia lingvo Esperanto;
Kiel la ĉina E-movado povos prosperiĝi?
16 **ESP-NOVAĴOJ**
38 **ĈINA KULTURO:**
Ĉinaj dioj de riĉeco
40 "Portista armeo" de Chongqing
42 Fragmentoj el mia vizito en Japanio (I)
44 Posedanto de rara ĉina poŝtmarko
45 **KURANTAJ AFEROJ**
46 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
48 La plej juna granda majstro de ŝako en la mondo
49 **POR KOMENCANTOJ:**
Du fabloj
50 **SUR NIA LIBROBRETO:**
Lotus-lanterno
51 **ĈINAJ METIARTAJOJ:**
Jada bovlo



Gaŭŝan-aj knabinoj
Foto de Lao Bai

Gaŭŝan-nacianoj, vivantaj ĉefe en Ali-mont-regiono de Taiwan-provinco, Ĉinio, portas originalajn ornamitajn vestojn. Jen gaŭŝan-aj knabinoj en siaj naciaj vestoj.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldomata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"
Direktoro: Wang Xifu
Adreso: P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio
Telefono kaj telefakso: +86-10-6832 1808

Retpoŝto: epc@china-report.com
Hejpaĝo: <<http://www.china.org.cn/EIPopolaCxinio>>

INTER NI.

Laŭ peto de nia pola leganto Krystyna Babian ni aperigas en ĉi tiu numero du artikolojn pri Taiwan, el kiuj unu temas pri ĝia historio kaj la alia pri ĝiaj pejzaĝoj, tradicia kulturo, popolaj moroj kaj kutimoj.

El la ĉinaj moroj la kulto pri dioj de riĉeco estas populara. Ĝi devenis de deziro de la antikvaj ĉinoj pri riĉa vivo. Oni esperis, ke dioj de riĉeco alportos bonŝancon de riĉiĝo. La artikolo "Ĉinaj dioj de riĉeco" en tiu ĉi numero konigas tiun tradician moron.

En Ĉinio multaj veteranaj e-istoj pasie amas Esperanton kaj ĉiamaniere faras ion por ĝi. S-ro Wang Chongfang estas unu el ili. Lia artikolo "Mia revo ĉe la sojlo de la 21-a jarcento" montras liajn deziron kaj laboron konigi per Esperanto la tradician ĉinan kulturon al la mondo.

Okaze de la 50-jara jubileo de EPĈ, ni dediĉos al niaj legantoj ĝian majan, koincide 500-an numeron kun memor-artikoloj.

La Red.

4[499]2000

Retrospektive al la 10-a jarcento

Antaŭ 1 000 jaroj sur nia tero estis ankoraŭ vasta kontinento nekonata de la homoj, sed en 1999 la homoj ne nur direktis sian rigardon al la senlima spaco, sed ankaŭ faris sian unuan paŝon por konstrui spacan urbon

de LI BO

ŜANGĜOJ EN LA PASINTA JARMILO

La 20-a jarcento forpasis kaj la homa civilizacio eniris en novan jarmilon.

En la homa evoluado de 3 milionoj da jaroj, 1 000 jaroj eble estas nur palpebruma daŭro. Se oni dirus, ke en la unua jarmilo la homa civilizacio progresis en la spirala evoluo, do juĝante la duan jarmilon, ni estus ne kontentaj, ke oni priskribas tiun periodon per la

vorto “impeto”.

Antaŭ 1 000 jaroj Ĉinio havis nur 16 milionojn da loĝantoj, dum en la okcidenta kaj suda Eŭropo — 27 milionojn, kaj tiam sur la tuta terglobo vivis ĉ. 60 milionoj da homoj. Tiam la meza vivdaŭro de la eŭropanoj estis nur 30-42 jaroj, sed en 1999 la tutmonda loĝantaro kreskis al 6 miliardoj kaj la meza vivdaŭro de la tuta homaro atingis 67 jarojn, dum tiu de la eŭropanoj — 77 jarojn.

Antaŭ 1 000 jaroj la agrikultura produktado ludis ŝlosilan rolon en progreso de civilizacio de la landoj kaj nacioj,

sed en la 20-a jarcento la nivelo de urbanizo kaj proporcio de la homoj okupataj je la terciara industrio estas la ĉefa marko de la nacia modernigo.

Antaŭ 1 000 jaroj la malsataj homoj ofte ĉagreniĝis, kiom da semoj ili devas rezervi por la venontjara produktado kaj kiom por la ĉi-jaraj manĝaĵoj, sed hodiaŭ dank’ al vasta praktikado de la tekniko pri reformaj genoj aperis bela perspektivo de la homa disvolviĝo — grandega fonto de manĝaĵoj.

Antaŭ 1 000 jaroj pergameni estis luksaĵo de la okcidentaj misiistoj kaj aristokratoj, kaj la




ĉina tekniko pri farado de papero ĵus enkondukigis en Eŭropon, dum Ĉinio mem estis antaŭvespere de tipografio. Sed en la lastaj jaroj de la 20-a jarcento komputeroj jam troviĝis en hejmoj de ordinaraj homoj, kaj interreto kunligis la tutan mondon.

Antaŭ 1 000 jaroj sur nia tero estis ankoraŭ vasta kontinento nekonata de la homoj, sed en 1999 la homoj ne nur direktis sian rigardon al la senlima spaco, sed ankaŭ faris sian unuan paŝon por konstrui spacan urbon.

Antaŭ 1 000 jaroj ĉu en Eŭropo, ĉu en Ĉinio, teokratia monarkio estis neŝanĝebla reĝimo, sed hodiaŭ demokratio, egaleco kaj libereco jam fariĝis fundamenta kriterio de la homa civilizacio.

Retrorigardante la civilizan evoluon en la pasinta jarmilo, ni sendube vidas, ke la 20-a jarcento estis plena de drastaj ŝanĝiĝoj.

Oni iam faris statistikon, ke en la unua duono de la pasinta jarmilo la pokapa jara produktovaloro en la mondo kreskis je nur 0.05%, dum en la



Norio



Rizid-priklilo

lastaj 180 jaroj je 1.17%. Ĉi-flanke la statistiko de sciencaj eltrovoj kaj invento kaj aplikado de novaj teknikoj en la 19-a kaj 20-a jarcentoj pli bone montras la rapidan disvolviĝon de la sciencoj kaj teknikoj. En la 19-a jarcento oni malkovris la teorion pri farado de generatoro kaj post 41 jaroj inventis la unuan elektromotoron. En la komenco

de la 20-a jarcento oni bezonis 30 jarojn por transdoni iun inventaĵon al ĝia praktikado, sed en la mezo de la jarcento oni bezonis 10 jarojn kaj poste nur malpli ol 5 jarojn. La multimedia komputero, informa ekspreso k.a. turniĝis de teorio al praktikado post nur 4 jaroj. Komence de la 11-a jarcento Bi Sheng jam inventis tipografion, sed post pli



ol 5 jarcentoj oni vaste utiligis la teknikon, dum pulvo, kiun ĉinoj inventis en la 10-a jarcento, post pli longa periodo vaste aplikigis en la homa socio. La scienca prospero en la 20-a jarcento pli profundigis kaj ekscitis la socian disvolviĝon.

En la lasta jarcento de la dua jarmilo la homaro spertis du mondmilitojn, kiuj englutis la vivon de preskaŭ 100 milionoj da homoj, dume pli da nacioj kaj landoj komplete sin liberigis el diktatoreco kaj koloniismo daŭrantaj plurajn jarcentojn kaj la homaro kreis militajn metodojn, kiuj povas pereigi la terglobon, kie disvolviĝis la homa civilizacio, samtempe la homaro kreis senprecedencan prosperon kaj grandegajn riĉaĵojn per sia propra saĝo.

En la pasinta jarmilo, malgraŭ ke la homoj spertis grandan turmenton kaj malĝojon kaj postvivis multe da katastrofoj, ili finfine trapasis la epokon de malriĉo kaj malklereco, forskuis diktatorecon kaj surpaŝis la vojon de libera regno laŭ la vera senco de la homa civilizacio.

LA MONDO KAJ ĈINIO ANTAŬ MIL JAROJ

La mondo antaŭ 1 000 jaroj ankoraŭ ne estis mondo en la vera senco. Tiam la homoj ankoraŭ ne vidis la kontinenton trans la oceano. Sur la mapo desegnita de arabaj geografoj Mekko estis la centro de la tero. En la okuloj de la eŭropanoj la mondo dividiĝas en tri partojn, t.e. Azio, Afriko kaj Eŭropo, do Jerusalemo estis la centro de la tero kaj Nilo, Eŭfrato kaj Gango ĉiuj fontis el Edeno.

En la jaro 933 ĉinoj faris grandegan mapon el 100 ruloj da sateno. En la okuloj de la tiamaj ĉinoj Ĉinio troviĝas en la centro de la mondo kaj Eŭropo estas nur ĉe malproksima mondfino.

Kvankam la indianoj kreis la brilan civilizacion majaan kaj

inkaan, tamen post 400 jaroj, kiam Kolumbo malkovris Amerikon, tiu vasta kontinento havis sian lokon sur la monda mapo. Afriko estas unu el la luliloj de la homa civilizacio, sed antaŭ 1 000 jaroj sude de Saharo kaj en Oceanio multaj nacioj vivis en la primitiva socio.

Rusio, la plej granda lando, siatempe estis malgranda Kiev-Rusa Duklando en la orienta parto de Eŭropo, dum Britio, kiu estis nomata reĝlando kun la suno neniam subiranta, siatempe estis nur dezerta insulo.

Fakte antaŭ 1 000 jaroj pluraj famaj eŭropaj urboj, kia Pompejo, estis englutita de vulkano Vezuvio. En la 10-a jarcento, kvankam aperis en Eŭropo multaj novaj urboj, kiuj iom post iom fariĝis industria, komerca, politika kaj kultura centro, tamen ili plejparte estis malgrandaj kaj plie kun kampara aspekto. Kompare kun Eŭropo, en la 10-a jarcento Arabio estis imperio kun multaj prosperaj urboj. Tiam en ĝia ĉefurbo Bagdado vivis miliono da loĝantoj. La prospero de Bagdado paligis multajn eŭropajn urbojn, samkiel la hodiaŭa Bagdado ne povas kompari sin kun Parizo. Tiam en la centro de Bagdado estis kastelo. Interne de ĝi estis grandioza palaco de kalifo kaj loĝejoj de palacaj oficistoj, kompletaj publikutilaj instalaĵoj kaj ekster ĝi — grandega komercdomo. Tie estis multaj komercistoj ĉiu kun kapitalo de milionoj da dinaroj.

Tamen antaŭ 1 000 jaroj la plej progresiva lando estis Ĉinio, kie regis Song-dinastio. En la Norda Song-dinastio la urboj disvolviĝis de fermitaj al malfermitaj. Tiam Kaifeng, ĉefurbo de la dinastio, estis politika, komerca kaj trafika centro kun miliono da loĝantoj. Tie estis multaj restoracioj, te-trinkejoj, prostituejoj, vendejoj de juveloj, apotekoj, librovendejoj k.a. La vespera foiro funkciis preskaŭ la tutan nokton. Tiu

prospereco klare vidiĝas sur la pentraĵo “Ĉe rivero en la Festo de Klaro kaj Brilo”.

En la komenco de la 10-a jarcento Ĉinio spertis kaoson kaŭzitan de la pereco de Tang-dinastio. Kvankam la sekvanta Song-dinastio ne plenumis regadon super la tuta lando, tamen la ĉina civilizacio atingis kulminon en sia disvolviĝo. La ekonomia kaj socia produktado rimarkinde leviĝis en Song-dinastio. Tiam aperis rudimenta rizid-priklilo en la meza baseno de Yangzi-rivero, kio multe mildigis la fizikan laboron en rizid-transplantado. Tiam oni uzis ankaŭ norion por irigacio. Dank’ al utiligo de norio oni multe mildigis la labor-intenson. En Song-dinastio oni enkondukis ankaŭ frumaturan rizon, kiun oni povis dufoje rikolti ĉiujare, pro kio multe leviĝis la riz-produktokvanto. En la Norda Song-dinastio la silka industrio estis prospera kaj tiam ĉinaj silkaĵoj vendiĝis preskaŭ en ĉiuj landoj. Rimarkindan sukceson atingis ankaŭ la porcelana produktado. La porcelanaĵoj produktitaj en Song-dinastio estis maldikaj kaj diafanaj. Estis progresiva ankaŭ ŝipfarado. Kompaso estis vaste uzata en navigado kaj havenoj ludis gravan rolon en kontakto de Ĉinio kun aliaj landoj kaj samtempe ĉinoj sin okupis je grandskala ekstera komerco.

El la 4 gravaj inventaĵoj de la antikva Ĉinio, kompaso, tipografio kaj pulvo estis faritaj preskaŭ en la sama tempo, t.e. la 10-a jarcento. Ili eksportiĝis en Eŭropon el Ĉinio en la Suda Song-dinastio. Brita filozofo Francis Bacon (1561-1626) diris, ke la tri gravaj inventaĵoj ŝanĝis la fenomenon kaj staton de multaj aferoj en la mondo kaj kaŭzis sennombrajn ŝanĝiĝojn kaj ŝajne troviĝas neniu imperio, skolo kaj planedo, kiuj povas ludi pli gravan rolon ol tiuj teknikoj por la homaj aferoj. ■

Historio de Taiwan

Ĉu vi povus konigi al ni ankaŭ la historion de Taiwan? Kiam ĝi revenos al la kontinenta patrujo?

Krystyna Babian (Pollando)

de JI PING

DE antikve Taiwan estas parto de la teritorio de Ĉinio. Esplorado kaj ekspertizo de arkeologoj pruvis, ke en neolitiko Taiwan jam havis indiĝenojn. La formoj kaj metodo de farado de ŝtonaĵoj, ostaĵoj kaj fajencaĵoj trovitaj en Taiwan estas tre similaj al tiuj de la samspecaj objektoj trovitaj sur la ĉeftero de Ĉinio. Tio montras konsistigan parton de la ŝtonaĵa kulturo de la ĉeftero disvolviĝantan en la sudoriento. Notoj en diversaj dinastioj de Ĉinio atestis, ke antaŭlonge Taiwan kaj la ĉirkaŭaj insuloj jam fariĝis parto de la teritorio de Ĉinio. Ekzemple en Yuan-dinastio (1279-1368) la centra registaro de Ĉinio establis sur Penghu-insularo kontrolejon, kiu administris Taiwan kaj la insularon.

En la antikveco Taiwan estis agresita de okcidentaj koloniistoj. Ekde 1624 nederlandaj koloniistoj okupis Taiwan 38 jarojn, dum hispanaj koloniistoj — Jilong kaj la ĉirkaŭajn lokojn en la nordo de Taiwan en 16 jaroj.

En 1662 ĉina nacia heroo Zheng Chenggong kaj lia armeo forpelis la invadintojn kaj reprenis la suverenecon de Taiwan. Li praktikis la politikon "kamparanigi soldatojn", progresigis la produktadon, fondis lernejojn kaj vigligis komercon, kio metis la bazon por plua disvolviĝo de Taiwan en la sekvantaj jaroj. Sed ekde la lastaj jaroj de la dua duono de la 19-a jarcento japanaj agresantoj okupis Taiwan 50 jarojn.

En 1945, laŭ la traktato subskribita de Ĉinio, Usono, Britio kaj Sovetunio, Taiwan rekuniĝis



La templo A-Ma en Taiwan
Foto de XU MINGQIANG

kun la ĉeftero de Ĉinio kaj revenis sub la administradon de Ĉinio. En 1949 la ĉina popolo renversis la putran reĝimon de Kuomintang kaj fondis la Ĉinan Popolan Respublikon. Post finiĝo de la enlanda milito, parto de la militaj kaj politikaj personoj de la kliko de Kuomintang retiriĝis al Taiwan kaj kaŭzis la apartiĝon de Taiwan disde la ĉeftero de Ĉinio. Sed la sangaj interrilatoj de la ĉinoj loĝantaj ambaŭflanke de Taiwan-markolo estas nerompeblaj. Ĉiuj ĉinoj insistas, ke en la mondo ekzistas nur unu Ĉinio, ke Taiwan estas parto de Ĉinio, kaj ke la suvereneco kaj integreco de la teritorio de Ĉinio estas neofendebaj. Observi la principon "unu Ĉinio", solvi la problemon de Taiwan kaj realigi la reunuiĝon de la patrolando sub la gvido de la orientilo "paca reunuiĝo kaj du sistemoj en unu lando" — jen la arda deziro de la ĉina popolo, inkluzive Taiwananojn, ĉinajn elmigrintojn kaj ĉiujn naciojn de Ĉinio.

Por kiel eble plej baldaŭ reunuigi la patrolandon, la ĉina registaro kaj la ĉina popolo multe penis. En 1993 grandaĝa s-ro Wang Daohan, prezidanto de la Ĉina Asocio de Rilatoj inter Ambaŭ Flankoj de Taiwan-markolo, kaj grandaĝa s-ro Koo Chen-fu, prezidanto de la Fonduso de

Interŝanĝo inter Ambaŭ Flankoj de Taiwan-markolo, havis intertraktadon en Singapuro, kiu vekis la atenton de la mondo. En 1998 ambaŭ havis duan intertraktadon en Ŝanhajo. Krome, de post kiam la interrilatoj de ambaŭ flankoj de la markolo iris el izoliteco en interviziton kaj kontakton, pli kaj pli multaj samlandanoj en Taiwan venis al la ĉeftero por viziti parencojn, turisme vojaĝi aŭ fari interŝanĝon. En la lastaj jaroj, ĉiujare 1.5 milionoj da homoj vizitis la ĉefteron. 41 000 komercistoj investis al la ĉeftero, la totala sumo de interkonsentita investo jam atingis 40 miliardojn da usonaj dolaroj, kaj la efektivigita investita sumo estis 20 miliardoj. La valoro de la komercado de ambaŭ flankoj de la markolo superis 140 miliardojn da usonaj dolaroj. Poŝtado, trafikado kaj komercado de ambaŭ flankoj progresis en iuj terenoj, ekzemple inter Xiamen kaj Gaoxiong ekfunkciis regula akvolinio.

Kompreneble la paca reunuiĝo ne povos esti realigita en palpebruma daŭro. Por atingi la finan celon, oni faru laŭperiodan intertraktadon, komercu surbaze de reciproka utilo, kreskigu konfidon kaj forigu dubojn. Kiel la unuan paŝon, ambaŭ flankoj povas unue fari interparolon kaj intertraktadon surbaze de "oficiala fino al antagonismo", aŭ interkonsiliĝi pri la proceduro de politika intertraktado, aŭ kunsidi pri aliaj demandoj interesantaj ambaŭ flankojn. Unuvorte, ambaŭ flankoj povos intertrakti ĉiujn aferojn kun la premiso persisti en la principo de unu Ĉinio.

La problemo de Taiwan estas historia problemo postlasita de la enlanda milito de Ĉinio kaj ekzistis jam 50 jarojn. Nun komenciĝis la jaro 2000, kaj antaŭ tio Hongkong kaj Makao jam revenis en la sinon de la patrolando, kaj ni kredas, ke la problemo de Taiwan havos kontentigan solvon. ■

Marŝo sur rulŝeĝo

La rakonto temas pri kriplulo malcedema al fatalo

de SHEN HONGLEI

SEN helpo de rulŝeĝo li povas nur "iri" per unu genuo. Ĝuste tiamaniere li atingis pintojn de montoj Hengshan en Shanxi-provinco kaj Huashan en Shaanxi-provinco, kaj per rulŝeĝo trairis la monton Tanggula kaj la dezerton Taklimakan helpate de multaj bonkoruloj...

POR KE LA SUNO EN LA SONGŬO NE MALLUMIĜU

Yin Xiaoxing naskiĝis en kamparana familio de suda Ĉinio. Li estis bela knabo tre ŝatata de la geavoj. Sed bedaŭrinde, li perdis irkapablon pro poliomjelito en sia okmonata aĝo.

Foje li ludis ĉe laĝeto, kaj preskaŭ dronis en la akvo, de tiam li eĉ timas vidi la laĝeton. En la songŭo ĝi fariĝis malluma falanta suno.

Liaj gepatroj tre amas lin, kaj konstruis domon el tri ĉambroj por ke li senzorge vivu. En mezlernejo li estis elstara kaj en la lernado kaj en la konduto. Diplomiĝinte, li ne volis vivi plu sub helpo de la gepatroj, li do fondis kokobredejon, kaj vizitis korespondan kurson de ĉin-medicina instituto. Li estis memfida al sia estonteco.

Kiam li estis 19-jara, li enamiĝis en knabinon. Tiuj tagoj estis la plej ĝojaj en lia vivo. Sed la gepatroj de lia amatino timis, ke li ne povas garantii feliĉan vivon al ilia filino, kaj arbitre ĉesigis ilian kontakton. En tiuj tagoj la malluma suno

en lia songŭo denove aperis. Tamen anstataŭ deprimiĝi, li brave stariĝis por batali kontraŭ la fatalo.

La 8-an de decembro 1991, li komencis sian longan marŝon sur rulŝeĝo.

STARI ĈE LA MALPROKSIMA HORIZONTO

En printempo de 1995, Yin surgrimpis la monton Huashan, la plej krutan monton el la kvin famaj montoj de Ĉinio. "Ĉiela Ŝtuparo" estas 3-metra montpasejo preskaŭ vertikala, kaj tuj apud ĝi estas abismo. Li grimpis per la du manoj alterne kaptante la ĉenon. Li klopodis 14 horojn kaj finfine atingis la pinton de Huashan-monto, tiam la mondo antaŭ li subite larĝiĝis. Nuboj ŝvebis sub liaj piedoj, li ne povis elteni la ĝojon kaj kriis el la tuta gorgo. Lia ĝojkrio eĉe resonis en la tuta monto.

En lia vojaĝo la vojo al la montpasejo de Tanggula estis plej malfacila. Pro la alta situo kaj manko de

oksigeno li nur povis iri 30 km ĉiutage. Foje la ĉielo subite malheliĝis, kaj ventegis. Yin haste movis sian rulŝeĝon al malalta loko apud la vojo, per surtuto sin volvis, kaj foj-foje sin movis por ke sablo ne superŝutu lin. Duonhoron poste, kiam la ŝtormo ĉesis, kaj li daŭrigis sian vojaĝon, li trovis, ke pluraj veturiloj renversiĝis de la ventego.

Fine li staris antaŭ la montpasejo de Tanggula je 5 231 m alta super la marnivelo. La monto estis tute blanka, kie "sur la ĉielo ne flugas birdo, sur la tero ne kreskas herbo". Antaŭ tio li sentis, ke la vivo estas malgranda sed brila. Survoje malsupreniri la monton li disŝiris sian testamenton kaj forĵetis ĝin en venton...

Yin Xiaoxing



En tri jaroj kaj kvar monatoj per la rulseĝo li "iris" 65 000 km, kaj postlasis siajn piedsignojn en multaj provincoj kaj regionoj de Ĉinio. Tiam li firme kredis, ke kie estas spuro, tie estas vivo, kaj kie estas vojo, tie estos liaj radsulkoj!

La dezerto Taklimakan estas konata kiel "Maro de Morto", sed li senhezite eniris en ĝin. En junio estis varmege, la temperaturo de la tersurfaco estis ĉ. 70°C. Li diris: "De iomete da pluvo sur la ŝajne senviva dezerto aperos verdaĵo, kaj eĉ oazo, same statas ĉe la kripluloj: se la socio donas al ili amon kaj prizorgon, en ilia koro estiĝas espero kaj fervoro pri la nova vivo..."

En dezerto li rampante fotis eŭfratan poplaron, ĉar li volis, ke lia vivo estu nefleksebla kiel poploj, kiujn oni laŭdis: "Firme vivas ili mil jarojn, forverkinte rekte staras mil jarojn, kaj falinte, ne putras en mil jaroj."

FELIĈAN VIVON

En sia vojaĝo li kvankam spertis malagrablojn, tamen li ricevis multan helpon de bonuloj, kio sentigis al li, ke la vivo estas feliĉa.

En Haikou, ĉefurbo de Hainan-provinco, li informiĝis el anonco ke revuo bezonas redaktoron, li do telefonis al la redakcio. Iu junulo varme parolis kun li kaj kuraĝigis: "Venu al ni!" "Mi estas... kriplulo." "Ne gravas!" Poste li estis vere akceptita de la redakcio. Post multfoja malsukceso li ricevis finfine laborpostenon.

Lasttempe li eldonis sian poemaron, en kiu li verŝis sian koran dankon al la bonuloj. Li diris, ke li vere volas danki tiujn, kiuj iam helpis lin, tamen tre bedaŭrinde, li ne kapablas trovi ilin kaj la ŝoforon, kiu sur Tibeta Altebenaĵo forpelis luparon por li, kaj la tibetan paŝtiston, kiu donis al li ŝnuron, kiam li grimpis montodeklivon...

Vojaĝu al Ĉinio okaze de la 50-jariĝo de EPĈ

Okaze de la 50-jariĝo de EPĈ ni organizos la "Vizit-grupon de EPĈ-amikoj". Ni proponas al niaj legantoj jenajn itinerojn:

Itinero I, Orienta parto de Ĉinio:

Pekino - Nankino - Suzhou - Hangzhou - Ŝanhajo (16-25 majo 2000)

La itinero komenciĝas de Pekino, kie troviĝas famaj antikvaj konstruaĵoj, kiaj la Granda Muro, Somera Palaco kaj Imperiestra Palaco. En Suzhou kaj Hangzhou estas la plej belaj ĝardenoj de Ĉinio kaj allogaj naturaj pejzaĝoj; kaj Ŝanhajo estas la plej prospera urbo de Ĉinio. Ĉi tiu itinero karakteriziĝas per kunfandiĝo de antikvo kaj moderno. Daŭro: 10 tagoj. Prezo: 400 USD/persono.

Itinero II, Silka Vojo:

Pekino - Xi'an - Lanzhou - Jiayuguan - Dunhuang - Turpan - Urumqi - Kantono (16-30 majo 2000)

Raportoj pri la Silka Vojo aperis en nia gazeto en 1996-1998, kaj multaj el niaj legantoj montris grandan intereson. Laŭ la itinero vi vidos la falangon de terakotaj militistoj kaj militĉaroj, la okcidentan ekstremon de la Granda Muro, la misteran budhan kavernaron en Dunhuang, la senhoman dezerton kaj kolorriĉajn morojn de nacimalplimulto. Daŭro: 15 tagoj. Prezo: 1 500 USD/persono.

Itinero III, Tibeto:

Pekino - Chengdu - Tibeto (Zedang - Lhasa - Xigaze - Lhasa) - Kantono (16-30 majo 2000)

Tibeto, loko plena de beleco de neĝa altebenaĵo, kun mistera lamaismo kaj riĉa tibeta kulturo, ĉiam altiras al si interesitojn. Daŭro: 15 tagoj. Prezo: 1 960 USD/persono.

Mendu antaŭ la 15-a de aprilo 2000 ĉe la Distribuata Fakto de EPĈ.

Tel. kaj telefakso: +86-10-6832 1808

Retpoŝto: epc@china-report.com

Majo estas la plej taŭga monato por turismo en Ĉinio, kaj ĉiu el la supraj itineroj estas rekomendinda. Ne preterlasu la ŝancon. Ni renkontiĝu en Ĉinio.

Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Mia revo ĉe la sojlo de la 21-a jarcento

de WANG CHONGFANG

MI havis multajn revojn dum mia vivo.

En mia infaneco min karesis svaga revo, ke mi, plenaĝiĝinte, faros ion mondkuan, ne herostratan, sed bonan al la postaj generacioj kaj sekve min eterne famigantan. Dum mia juneco, kun tiu ĉi revo mi diligente lernadis kun avido por akiri al mi sciojn. Sed la pliaĝiĝo sobriĝis min kaj mi ekkonsciis, ke por mi, ordinarulo timida kaj mezkapabla, voli fari ion mondkuan efektive estas revo ĥimera. Mi dronis en deprimiteco kaj sendecideco, kaj ĝuste tiam mi hazarde ekkonis Esperanton. Ĝi tuj altiris min per sia "interna ideo". Zamenhof estis judo ordinara, sed li havis koron plenan de homamo, kiu instigis lin krei Esperanton kaj dediĉi sian tutan vivon al la disvastigo kaj aplikado de ĝi, kio akirigis al li universalan respekton de la esperantistaro, sendistinge pri politika konvinko kaj religia kredo, pri aĝo kaj sekso, pri la socia pozicio kaj profesio, pri haŭtkoloro kaj raso. Ĉu tiu ĉi idealo pri interhoma frateco kaj la sindonemo de Zamenhof ne estas tio, al kio mi sopiras kaj strebas? Mi do komencis lerni Esperanton kun granda intereso kaj de tiam mi sekvadis la vojon de dumviva esperantisto ĝis hodiaŭ. Mi tiam teksis al mi novan revon: mi nepre devos ellerni Esperanton ĝis plena posedo kaj, sekvante la ekzemplon de Zamenhof, labori kun zorga konscienco por fari ion utilan al la socio kaj la homaro. Por tio

nepre necesas ne alta talento, sed fera persisteco kaj severa konstanteco. En la tiama politika atmosfero de nia lando, mia lernado de Esperanto ŝajnis al miaj kolegoj kaj konatoj ago stranga kaj eĉ kondamninda. Sed mi kredis la aforismon: iru vian vojon kaj lasu al aliaj kritikaĉi kaj moki, kaj mi plu persiste lernadis. Dum la "Granda Kultura Revolucio" finfine malfeliĉego falis sur min. Pro mia ofta internacia korespondado per Esperanto mi estis kondamnita kiel homo havanta kontraŭleĝajn rilatojn kun fremdaj landoj kaj estis devigita submetiĝi al politika ekzameno en izoliteco, kiu kaŭzis al mi grandajn mensajn turmentojn, kaj oni eĉ konfiskis ĉiujn miajn Esperantajn librojn kaj korespondaĵojn, kiuj estis por mi tre karaj. Poste mi estis liberigita kiel suspektato, kontraŭ kiu la enketo ne malkovris konvinkajn pruvojn (fakte mi estis tute senkulpa honestulo!), kaj mi denove enprofundiĝis en la studadon de Esperanto. Mi multe legadis Esperantajn librojn kaj faris notojn pri Esperanta vortouzado sur dekmiloj da slipoj. Dum la 70-aj jaroj, kuraĝigite de s-ro Tikos, fama ĉina esperantisto kaj mia instruisto de Esperanto, mi partoprenis en la kolektiva tradukado de Poemoj de Mao Zedong. En la 80-aj jaroj mi partoprenis ankaŭ en la kompilado



La aŭtoro

kaj kontrolado de Esperanto-Ĉina Vortaro sub la ĉefredaktorado de s-ro Honfan. Pli poste mi ankaŭ esperantigis la faman ĉinan romanon "Kamelo Ŝjangzi" kaj la konfuceanisman biblion "Analektoj de Konfuceo", per kio mi kontribuis al la interŝanĝo de la Orienta kaj Okcidenta kulturoj en la mezuro de miaj kapabloj. En 1993 mi komencis kompili mian ĉina-Esperantan vortaron, kiu ampleksas pli ol 80 000 artikolojn. La kompilado laŭplane daŭros 10 jarojn. Nun la manuskripto ĝis la lasta litero Z jam estas finita kaj tute enkomputerigita. Post la finiĝo de la tuta manuskripto mi tajpos ĝin per komputero por fari al ĝi reviziadon, kaj pri ĝia sukcesa finkompilado mi estas tre optimisma.

Kiam mi skribas tiun ĉi artikolon, la 20-a jarcento jam proksimiĝas al sia fino kaj la sonoriloj baldaŭ anoncos la komencon de la 21-a jarcento. Ĉe la sojlo de la nova jarcento svarmas

ENKETO DE EVA

Kiuj estas la plej indaj verkoj el la Esperanto-literaturo?

en mia kapo miloj da pensoj pri la pasinteco kaj la estonteco. Mi jam fariĝis el junulo plena de suko de la juneco grizharulo, kiu, dediĉinte preskaŭ kvindek jarojn de sia vivo al Esperanto, tamen ĉiam trovas nesufiĉaj siajn laborojn por ĝi. Mi pensas ankaŭ, ke homo maljuna kiel mi devos morti pli aŭ malpli baldaŭ kaj, antaŭ ol mi forlasos tiun ĉi mondon, kion plian mi devos fari por nia kara lingvo? Mi devos bone ordigi miajn materialojn sur la slipoj kaj donace prezentos ilin al la estonta generacio. Mi havas la feliĉon ĝisvivi la komputeran epokon. La komputero multe helpas min en la kompilado de mia vortaro kaj ordigado de miaj materialoj, kaj mi devos ankoraŭ pli bone utiligi ĝin. Mi ankaŭ planas, ke post la finkompilado de la ĉina-Esperanta vortaro, mi kompilos per la helpo de komputero alian vortaron, nome Vortaron de Esperanta Stilo, kiu traktos ĉefe pri la kunuzadoj de vortoj kaj idiotismaj kombinaĵoj. Krome ĝi devos enhavi ankaŭ sinonimojn, antonimojn, proverbojn ktp. Mi esperas, ke ĝi povos servi al la tuta esperantistaro de la mondo kiel praktika konsultolibro. Cetere, mi ankaŭ intencas traduki la ĉinan klasikan filozofian verkon Laozi en Esperanton. Se ĝi estos esperantigita, tiam la du plej ĉefaj verkoj de la ĉina kulturo, kiuj reprezentas respektive konfuceanisman kaj taoisman, la du ĉefaj pensoskoloj en la antikva ĉina historio, havos ĉiu sian Esperantan tradukon. Mi pensas, ke se nur la Ĉielo favoros min donante al mi sufiĉan vivdaŭron, mi certe povos bone finplenumi la du laborojn. Pri tio mi havas plenan memfidon. Laŭ mi, se dum sia vivo oni povas sukcese plenumi kelkajn aferojn, kiujn oni trovas farindaj kaj memvole faras, ĉu tio ne estas por li la plej granda plezuro?

Jen mia revo ĉe la sojlo de la 21-a jarcento. Mi deziras, ke ĝi estu plenumita. ■

Ni adiaŭas la 20-an jarcenton, kiu estis tempo de du teruraj Mondmilitoj, sed ankaŭ tempo de nekredibla teknika progreso. La homa civilizo trapasis la limojn de sia tera ekzisto, kiam la unua homa plando ektuŝis la lunon. La finiĝanta jarcento estis ankaŭ tre grava por ni, esperantistoj. Ĝi signifis kreskon de niaj vicoj tra la tuta mondo, la Zamenhofa lingvo trapasis la limojn de la kontinentoj, por enradikiĝi ĉie. Ni ne forgesu, ke la 20-a jarcento estas la tempo, kiam ekprogresis nia literaturo. La *Slava skolo*, *Literatura Mondo*, *La infana raso* de William Auld, *Norda Prismo*, *eldonejo Stafeto* de J. Regulo Perez, *Literatura Foiro*, *Fonto*, *Belartaj Konkursoj*, Karolo Piĉ — jen mejloŝtonoj de la evoluo. Al tio aldoniĝas centoj da aperintaj libroj (gravaj kaj malpli gravaj), kaj dekoj da eldonejoj. Ĉiuj ĉi klopodoj havigis al ni esperantistoj neforgeseblajn momentojn, kiam legante niajn aŭtorojn, ni povis konvinkiĝi, ke la lingvo internacia vivas kaj fortikiĝas. La literaturo iĝis ligilo por miloj da esperantistoj kaj rimarkinde kontribuis al la formiĝo de nia “verda” memo en ĉi mondo skuata kaj kruele disŝirata per militoj, naciaj malamoj, rasaj konfliktoj kaj lingvaj baroj.

Nekontestebla estas fakto, ke en la pasanta jarcento ĉefe libroj kaj revuoj

(kaj leteroj) servis kiel unuigilo por nia tutmonda komunumo. Romanoj kaj poemoj estis ofte la fonto de niaj revoj, pensado, emocioj kaj distro.

Dum la kunsido de EVA en Berlino, okaze de la 84-a Universala Kongreso, oni akceptis la proponon de kolego Tomasz CHMIELIK, kiu apud la konata prefero-listo de William Auld ŝatus koni ankaŭ iun pli malpli ĝeneralan elekto-liston de la publiko pri la 25 plej gravaj verkoj de la Esperanto-literaturo de la 20-a jarcento.

Pro tio ni petas la esperantistojn el kie ajn noti la titolojn de la Esperanto-verkoj (prozo, poezio kaj dramo), kiuj en Via vivo ludis precipan rolon — edukon, klerigan, emocian kaj konceptan, kiuj plej firme engravuriĝis en Via memoro aŭ kiuj simple estas plej valoraj por Vi.

Via elekto montros al ni, kiuj literaturaj ŝatoj kaj preferoj regas en la “verda” mondo kaj en la nuna tempo. Ni atendas Viajn respondojn plej malfrue ĝis majo, tiel ke dum la UK en Israelo ni povos prezenti la kompletan liston.

Poŝtkartojn kun titoloj oni sendu al la adreso: Tomasz CHMIELIK, ul. Jarzebinowa 3/30, 21-040 SWIDNIK, Pollando.

Retpoŝte (sub indiko “enketo de EVA”) oni povas respondi al la adresoj: esperanto@zg.tel.hr aŭ gberveling@freeler.nl

Freneza rakonto

de ROBERTO CHEVALLIER
(Francio)

UN vesperon mi havis nenion por fari kaj decidis iri aŭskulti prelegon de iu politikulo nekonata de mi kaj malmulte konata de aliaj.

Li parolis longe pri niaj prauloj, kiuj vivis en tempo plurajn jarcentojn antaŭ nia tempo. Li rememorigis la malfacilan vivon de tiuj prauloj, kiuj ne nur batalis ĉiutage kontraŭ multaj malfacilaĵoj, sed ankaŭ transdonis la vivon al siaj posteuloj kaj plue plibonigis iom post iom la vivkondiĉojn ĝis la multe pli agrabla kaj komforta vivo spertata de ni.

Li diris tion kaj tion, kaj mi dormis kaj sonĝis dum lia prelego. La bruoj de la aŭskultantoj je la fino vekis min.

Tamen, ĉu pro la prelego, ĉu pro la sonĝo, mi opiniis, ke oni devas esti multe dankema al tiuj prauloj, kiuj forpasis antaŭ ni sur la tero, vivis, laboris, batalis, suferis, generis kaj plue, konstruis, perfektigis, inventis por aldoni al ni pli agrablan vivon.

Do mi pensis, ke mi ŝuldas multe al ili; tiam venis al mi la ideo, ke mi devus inviti ne ĉiujn, sed almenaŭ kelkajn el miaj prauloj, al ia dankfestoj organizota en mia domo.

Mi pripensis tian imponan projekton, precipe dum la nokto, duondormante. Aparte mi min demandis kiel mi povus sendi inviton al ili. Pro tio mia mieno ŝajnis malfeliĉa, kiam marŝante sur la trotuaro, mi renkontis mian deputiton al la nacia asembleo. Tiu deputito aspektis kiel mia malnova amiko: li brakumis min, preskaŭ kisis min kun fluego da koraj paroloj.

Mi diris "mian" deputiton, sed al vi, leganto, mi devas diri, ke mi donis mian voĉon al alia kandidateco.

Mi klarigis al li mian problemon. Tuj li trovis kaj donis al mi la solvon. Li diris: "Skribu vian invitleteron, metu ĝin en koverton, sur kiu vi devas indiki nur 'al praulo de tiu epoko' (elektita de vi). Ne forgesu la afrankon kaj glitigu ĉiujn leterojn en la buŝon de la kloako plej proksime de via domo."

Vere stranga konsilo, mi pensis. Sed, sen alia rimedo mi agis zorge laŭ la oportuna indiko de "mia" klera deputito.

En la tago de la festo, ĉe la tagiĝo mi estis jam vekita. Mi superŝarĝis mian edzinon kaj precipe mian bopatrinojn per multaj rimarkoj, konsiloj, ordonoj ktp. Samtempe mi korpremiĝis pli kaj pli, esperante kaj ankaŭ timante la alvenon de la invititoj.

Subite mi aŭdis malkutiman bruon: takte pezajn batojn sur la tero, kiu preskaŭ tremetis; samtempe laŭ alia takto, fortan blovon kiel tiu de blovilo de forĝisto.

Estis mia praulo de ŝtonepoko, kiu venis kurante kun sia supermezura klabo, kiun mi ne kapablis leveti kiel mi provis poste. Estis fortikega homo kovrita de longaj haroj sur lia tuta korpo, kun forta vira odoro, kiu ŝajnis plaĉa kaj agrabla bonodoro al mia bopatrino.

Li havis certe grandegan flarkapablon, ĉar li iris rekte ĝis la rostilo, kiu feliĉe estis lokita en la ĝardeno por rosti diversajn bestojn pretigitajn de mi. Kaj li komencis gluti, plenumordante la sanggutantan viandon.

Je tiu momento mi aŭdis alian taktan bruon kiel faras galopanta ĉevalo. Estis mia praulo de la mezepoko sur preskaŭ sovaĝa ĉevalo, kiu saltis trans la barilon de la ĝardeno kaj surteriĝis meze de belega florbedo aranĝita de mia edzino. Ŝi multe fieris pro ĝi kaj



ekkriegis, kiam ŝi vidis la detruon. Tuj mia praulo eligis sian longan spadon per tiel larĝa movo, ke li preskaŭ tuŝis la harkovritan praulon, kiu tuj levis sian pezan klakon. Mi timegis brutan batalon, kiam oportune alvenis la hundo de mia bopatrino.

La unua puŝis sian spadon tra la malfeliĉa besto kaj la dua batis ĝin forte per sia klabo kaj rapidege per stranga tranĉilo el ŝtono senfeligis ĝin. Tiam la unua, uzante sian spadon kiel tumorostilon, rostis la beston kaj ambaŭ glutis ĝin. Vidante tiun teruregan spektaklon, mia bopatrino paliĝis kaj, retroirante, falis en la puton.

Tiam mi aŭdis denove alian taktan bruon kiel faris antaŭ nelonge la vaporveturiloj: ŝajnis ĝemaj sopiroj ĉiam renovigitaj post longa silento. Estis mia praulo de ekteknika epoko, kiu alvenis veturante per sia vapor-aŭtomobilo. Li alportis multajn bobenojn de elektraj dratoj, ĉar li volis surprizi min per la lasta tute nova invento konata de li — la telefono. Mi provis klarigi al li, ke nun oni ne plu bezonas dratojn por interparoli trans longegaj distancoj, sed li ne kredis min kaj malvolvis siajn bobenojn en la tuta domo precipe sur kaj tra la pendlampoj, kiuj ŝajnis tre utilaj al li. Fine plankoj kaj ŝtuparoj estis kovritaj per diversaj koloraj dratoj. Mia edzino implikis siajn piedojn en tiujn dratamasojn, falis kaj rompita al si la kruron.

Iom post iom terura sento okupis min, kiam mi ekkonstatis, ke vesperoj alvenis. Ĉu miaj invititoj volus pasigi la nokton en mia domo? Ĉu mi devus gastigi ilin, kaj dum kiom da tempo? Sed tute strange, sen diri iun ajn vorton, ekde la sunsubiro ili ĉiuj foriris

samtempe kaj rapide.

La difektoj kaj detruo en mia domo estis grandegaj, sed nova ideo alvenis al mi.

Ĉar nun niaj politikistoj parolas multe pri la devo de civitanoj rilate al la patrolando kaj la prapatroj, kiuj faris nian nunan patrujon, ĝermis en mia cerbo la ideo, ke mi meritis kelkajn justajn rekompencojn aŭ prefere iun ajn kompenson aŭ subvencion pro mia dediĉo al tiu meritinda kaŭzo. Do, plenesperante mi decidis raporti pri mia afero al "mia" deputito, kiu tiel bone konsilis al mi kiel inviti miajn prapatrojn. Mi priskribis detale la detruojn okazintajn en mia domo, ĉefe la sekvantajn:

* la tablo en la manĝoĉambro, frakasita de la ŝtonepoka praulo per lia klabo,

* ĉiuj seĝoj en la domo, rompitaĵoj de la sama, kiam li provis sidiĝi sur ili, unu post alia, ĉar antaŭ ol foriri li vidis mian bopatrinojn ĝemanta sur brakseĝo post ŝia eltiriĝo el la puto,

* ĉiuj kusenoj, kapkusenoj, lanugaĵoj, remburajoj de seĝoj, ŝiritaj de mezepoka praulo per lia spado, kiam li amuziĝis trapiki ilin, sur kiuj plurfoje li desegnis per la pinto de sia spado unu literon, kiu aspektis kiel Z,

* centoj da metroj da elektraĵoj dratoj, torditaj ĉirkaŭ la rompitaĵoj mebloj, plektitaj ĉirkaŭ ĉiuj lampoj aparte ĉirkaŭ la pendlampoj, ĉie en la domo inkluzive de la koridoro kaj de la ŝtuparo, eĉ ĝis la hunda dometo, sen menci la elektran rektan kontakton, kiu preskaŭ forbruligis la domon,

* la rompita kruro de mia edzino,

* la falo de mia bopatrino en la puton; tiu falo kaŭzis rompon de la ŝnuro, al kiu pendis sitelo, ankaŭ kiu falis ĝisfunde en la puton,

* ktp...

La nura bona afero estas la malapero de tiu abomena hundo, sed tion mi ne menciis en mia skribaĵo.

Kiel en la unua fojo mi metis mian leteron en taŭgan koverton kun la adreso de "mia" deputito kaj glitigis ĝin en la saman buŝon de la kloako apud mia domo.

Mi estas certa, ke mi baldaŭ ricevos la respondon, ĉar mi atendis ĝin jam ok monatojn. ■

● KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

★ KOMENCANTO - tre interesa internacia revuo. Poŝtkesto 132, Ekaterinburg, 620041, Ruslando.

★ Zhang Rui, 8-j. knabo, dez. kor. tm. pri ĉt., interesiĝas pri pm., bk., cigaredujoj kaj libroj. Adr.: 402/14 Jiao Fu Ying, Fuzimiao, 210001 Nankino, Jiangsu, Ĉinio.

★ Membroj de ESZ, oficiale ĝemela urbo de Kunming, dez. kor. kun ties s-anoj. Adr.: ESZ, P.F.858, CH 8034 Zurich, Svisio.

★ 26-j. studento dez. kor. tm. pri ĉt. Respondo garantiata. Ĉiama Adr.: Afshin Rasoli, No 14, Homayune Lane, SH. Rajayi Street, IR-69156 Borujerd, Irano.

★ 26-j. studento dez. kor. tm. pri literaturo, kino, filozofio kaj komputero. Respondo garantiata. Ĉiama adreso: Babak Rasouljan P.O. Box 165, Borujerd, Irano.

★ S-ro Edgars Ŝeimanis (34-jara invalido) dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: "JAUNVILANOS" 4-5, P/N. Vilani, LV-4650, Rezeknes Raj., Latvio.

★ F-ino Jveta Dubovska (22-jara invalido) dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: "KRIEVKALNI", P/N Danieli, LV-4130, Cesu Raj., Latvio.

★ F-ino Kristine Hanzena (16-jara lernanto) dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: "GRIVAS", P/N Lone, LV-5224, Jekabpils Raj., Latvio.

★ S-ino Jveta Rude (40-jara psikiatro) dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: Adama Iela 2, Dobele, LV-3701, Latvio.

★ F-ino Edite Grostina (28-jara studento) dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: 31.ist., Pales Iela 14/4, Riga, LV-1024, Latvio.

★ F-ino Aija Lazdina (26-jara studento) dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: "BULLOS", P/N Dzimtmisa LV-3911, Bauskas Raj., Latvio.

★ E-istoj 10-20-j. dez. kor. tm. Adr.: Interklubo "E-to", n-ro 6-135, Str. 60 let Oktjabria, 626440, Niĵnevartovsk-6, Rusio.

★ Ya-zu kreinto Dr. Ts. Bold, 50-j., dez. kor. kun e-istoj, kiuj interesiĝas pri Ya-zu (Azia) lingvo kaj povas senpage sendi al tiuj, kiuj volas lerni ĝin, Ya-zu lernolibreton, interparolileton kaj vortareton. Adr.: Ya-zu kreinto Dr. Ts. Bold, P. O. 30, kesto 20, Ulanbatoro, Mongolio.

Propra opinio pri la internacia lingvo Esperanto

de JOZEFO KRISTIAN (Slovakio)

MI tre atentis praktikadon de Esperanto en la socio, kiu profundigas amikecon, riĉigas sciojn kaj etendas propagandon de nia lingvo. Post pli-ol-19-jara praktikado mi konsciis, ke ĝi restos utopio, se ĝi ne estos aplikata en ĉiuj sferoj de la ĉiutaga vivo. Mia opinio ne sufiĉas, se ni nur malofte ĉeestas diversajn E-aranĝojn. Ni povas perfektigi nian lingvoscion ankaŭ per la ĉiutaga legado de Esperantaĵoj kaj helpe de korespondado kun gesamideanoj en- kaj eksterlande. Nia celo estas montri per nia monda agado, ke Esperanto estas egalrajta komunikilo en ĉiu sfero de la socia vivo.

La plej granda aranĝo de esperantistoj fariĝis la 84-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1999 en Berlino, kie renkontiĝis 2 616 parolantoj de Esperanto. La lingvouzado fariĝis ekskluzive ESPERANTO dum ĉiuj aranĝoj de la kongreso, tiel pruvis kaj ĝuis la vivecon kaj utilecon de la internacia lingvo Esperanto.

Vere, ĝi estas nur lingva perilo, servanta al ĉiuj nacioj

dum ilia interkomunikado. Bedaŭrinde, en la Slovaka Respubliko la nombro de esperantistoj estas tre malalta, iom pli ol 300 personoj, kies kaŭzo estas, ke ni malbone propagas ĝian disvastiĝadon inter loĝantoj kaj konatuloj.

Nia lando abundas je naturbelaĵoj, multas belaj bildkartoj pri ĝi, sed surdorse oni trovas epigrafon slovake, angle kaj germane, sed mankas Esperanta klarigo. Kial? Ĉu la teksto presita Esperante kostas pli multe ol slovaka aŭ alilingva? Mia opinio ĝi estus la unua metodo de propago de Esperanto, pli malmultekosta ol eldoni diversajn gazetojn aŭ bultenojn. La dua metodo estus, se la internacian lingvon rekonus la ministrejo de klerigo kaj estus enkondukita Esperanto, kiel studobjekto en mezlernejoj (la studentoj povus elekti: anglan, francan, germanan lingvon aŭ Esperanton).

Plejmulto de esperantistoj agadas en Ĉinio kaj en tiuj landoj, kie la loĝantoj ne uzas la latinan alfabeton, sed sian propran skribmanieron, kiun nur malmultaj eŭropanoj komprenas aŭ alproprigas. Mi alte taksas la monatan gazeton “El Popola Ĉinio”, kiu aperigas

tre interesajn artikolojn pri la vivo de loĝantoj, informas pri sukcesoj de la ekonomio, pri tekniko kaj scienco, pri popolaj kutimoj kaj moroj, pri grandiozaj konstruaĵoj, ekz. pri la Granda Muro kun totala longeco de 6 700 km, pri Tibeto kaj Hongkong, pri reformado kaj pordmalfermo en Ĉinio ekde la jaro 1978, eĉ pri la plej novaj politikaj kaj ekonomiaj sukcesoj. Mi tre ŝatas legi ankaŭ “Heroldo de Esperanto”, “Internaciisto” el Hispanio kaj la trimonatan periodaĵon de la TIETTI-instituto de Esperanto en Togolando. Mi ricevas ilin de miaj geleteramikoj honore al nia amikeco.

La internacia lingvo fortiĝos nur tiam, kiam ekzistos grupo de homoj, kiuj akceptus ĝin kiel sian heredan lingvon. La regulo de nia agado devas esti: persisti en la uzado de nia lingvo, paroladi, skribadi, riĉigadi ĝin per literaturo, ĝis ni atingos la tempon, kiam ĝi aperos en la okuloj de la mondo, kiel familiara konstanteco. El tio sekvas neceso severe gardi nian unuecon kaj imiti la stilon de L. L. Zamenhof. La devizon ĉiu vera esperantisto devus havi en sia koro kaj en sia spirito. ■

Kiel la ĉina E-movado povos prosperiĝi?

de LIU YANHUA (Ĉinio)

LAŭ mi, la ĉina Esperanto-movado ne estas tiel vigla kiel en la 80-aj jaroj. Por ŝanĝi la situacion, oni devas solvi multajn malfacilojn. Kiel multjara esperantisto, mi volus interkonsiliĝi kun la samideanoj pri la problemoj, resumante mian sperton en la Esperanta aktivado en la pasintaj 40 jaroj.

I. Levi la socian pozicion de Esperanto

Laŭ la aktuala situacio de la ĉina socio oni difinu Esperanton kiel la duan fremdan lingvon por diplomi studentojn kaj ekzameni kadrojn kaj esplorajn studentojn. Tio grandigos ne nur la esperantistaron, sed ankaŭ la sferon de apliko de Esperanto. Tial mi proponas, ke la Ĉina Esperanto-Ligo klopodu, por ke la koncernaj instancoj de la ŝtato konsentu preni Esperanton kiel la duan fremdan lingvon.

II. Kompili Esperantajn lernolibrojn

Ĉinaj esperantistoj plendas, ke mankas en Ĉinio Esperantaj lernolibroj, referencaj libroj kaj legaĵoj. Mi proponas, ke oni tuj kompilu lernolibrojn taŭgajn por mezlernejo, supera mezlernejo kaj altlernejo. Lernolibro devas esti konsistanta el volumoj de konversacio, scienco kaj tekniko, komerco, dudirekta tradukado, gramatiko kaj historio de Esperanto. Konformaj sohbenoj estas necesaj. Krome mi esperas,



La aŭtoro

ke ĉiujare oni eldonos 5 interesajn Esperantajn legaĵojn (kun ĉina traduko) kaj ankaŭ famajn alilandajn verkojn (certe kun notoj).

III. Esperanta turismo

Tiun laboron oni faru en tri paŝoj: Unue, oni kulturu profesiajn (aŭ kumulajn) esperantistajn ĉiĉeronojn; due, eldonu Esperanta-ĉinajn turismajn gvidlibrojn por vizito de pitoreskejoj de Ĉinio kaj turismajn mapojn por vizito de ĉinaj urboj; kaj trie, riĉigu la programerojn en televido kaj radio pri Esperanta turismo.

IV. Plioftigi internacian komunikadon

La Ĉina Esperanto-Ligo instigu la ĉinajn esperantistojn pli aktive fari internacian korespondon kaj partopreni en kultura kaj scienca aktivado. La redakcio de "El Popola Ĉinio" donu pli grandan spacon al la rubriko "Korespondi Deziras".

V. Kombini Esperanton kun scienco kaj tekniko

Diskonigo de Esperanto inter la sciencistoj kaj teknikistoj devas esti longedaŭra strategia celo de la Ĉina Esperanto-movado. Mi opinias, ke kune kun la alproksimiĝo de la ekonomio de scioj, la perspektivo de Esperanto dependos de ties kombiniĝo kun scienco kaj tekniko.

VI. Krei bonan atmosferon por Esperanto-lernado

En 1988 kaj 1989, en iuj urboj de Ĉinio viglis "Esperanta Angulo", "Esperanta Klubo" k.s. La bona efiko de tiaj renkontiĝoj estis evidenta. Mi opinias, ke oni devas revigligi tiajn aktivadojn. Societo sen akademia aktivado estas senviva!

VII. Disvastigi Esperanton per modernaj metodoj

Mi proponas eldoni videodiskojn en Esperanto pri pitoreskejoj, kulturo, historio, nacioj, pentraĵoj kaj kaligrafaĵoj konservataj en ŝtataj muzeoj, filmoj vaste ŝatataj k.a. Krome, dank' al la populariĝo de interreto, milionoj da homoj jam aliĝis al la reto. Oni devas instigi pli multajn homojn rete lerni Esperanton, komunikiĝi kun fremdlandaj samideanoj ktp.

VIII. Vigligi la laboron de la Ĉina Esperanto-Ligo

Mi esperas, ke "El Popola Ĉinio" fariĝos pli kaj pli plaĉa kaj nia Esperanto-movado pli kaj pli vigliĝos! ■

ĈINIO

● La 15-an de decembro 1999 ekis la Aglido-Agado, lanĉita de Sun Mingxiao, Cui Guoqing, Dong Shulin kaj Liu Yanchun, membroj de UEA kaj de la Zaozhuang-a E-Asocio de Shandong-provinco, cele kulturi kaj vigligi fakajn e-istojn en diversaj kampoj; altigi la lingvan nivelon post E-lernado; akceli E-disvastigon, -popularigon kaj -praktikadon. La agado ampleksas



Membroj de la Aglido-Agado

kvar flankojn, t.e. kono, lernado, diskuto kaj ago. Konforme al la agado fondiĝis "kovejo" en la ekonomia institucio de la urbo. Dank' al Esperanto juna rusa e-istino Tanja kaj Cui Guoqing konatiĝis kaj enamiĝis unu al la alia. La 16-an de decembro ŝi venis en Zaozhuang por stimuli la agadon kaj faris prelegon al pli ol 150 lernantoj pri la vivo de rusaj junuloj kaj rusa E-movado. (Liu Yanchun)

● La 5-an de januaro 2000 la Ĉina Poŝta Buroo emisiis specialan poŝtmarko-serion "Jaro de la Drako". La Changshu-a Filatela Kompanio de Jiangsu-provinco kaj la Haikou-a Filatela Kompanio de Hainan-provinco uzis en la emisia tago memorigajn poŝtstampilojn kun vortoj en la ĉina lingvo kaj Esperanto, kies desegninto estas s-ro Zhang Linrui.

ĈEĤIO

● Nova ZEO aperis en Ĉeĥio. Antaŭ Kristnasko de 1999 decidis la Urba Konsilantaro de Prostejov pri nomigo de unu el la novaj stratoj de la urbo. La strato nomiĝas "Esperanta". Tiel finfine sukcesis plurjaraj klopodoj de lokaj esperantistoj.

(Milan Smely)

GERMANIO

● La Esperanto-Asocio en la Eŭregiono Mozo-Rhejno okazigos la Internacian Trilandan Renkontiĝon. Esperantistoj el Germanio, Nederlando kaj Belgio tradicie kunvenos ĉi-foje en Botrange, Belgio, la 21-an de majo 2000. Informoj haveblaj ĉe: Klaus Hogen, Schutz-von-Rode-Str. 43, D-52134 Herzogenrath. Telekopiilo: xx-49-2406-7706; Reto: <hogen@t-online.de>

(Klaus Hogen)

HISPANIO



Gelernantoj de la elementa E-kurso en Barcelono diplomitaj

● La 7-an de decembro 1999 honore al esperantisto Ramon Fernandez Jurado oni inaŭguris la placon "Esperanto" en la urbo Castelldefels apud Barcelono, samloke ankaŭ modernan monumenton al Esperanto kaj planko-tabulon sur la placo dediĉitan al R. Fernandez Jurado. La eventon ĉeestis la urbestro de Castelldefels kaj centoj da e-istoj. Nome de ili salutis kaj festparolis Marti Guerrero.

● Barcelona Esperanto-Centro (BEC) festis la Zamenhofan feston la 29-an de decembro 1999. Festparolis s-ro Manuel de Seabra, fama e-ista verkisto kaj poste li kaj sekretario de BEC, s-ano Manuel Lopez, disdonis diplomojn al la gelernantoj de la elementa E-kurso.

(Salvador Aragaj)

POLLANDO

● Esperanto-Klubo en Kulturdomo de Staszow invitas vin al XII Esperantaj Tagoj de Staszow, 25.05-28.05.2000. Adreso: Kulturdomo, Parkowa 6, 28-200 Staszow, Pollando. Tel: 015-8644112. (Esperanto-Klubo)

UKRAINIO

● La 7-9-an de januaro 2000 en Odessa de Ukrainio okazis "Kristnasko-2000", junulara renkontiĝo de ekologiemaj esperantistoj. En la programo estis: urboludo, kristnaska birdokalkulo en apudurbo de Odessa, ekskursoj al zoologia ĝardeno, al oranĝerio de Odessa Botanika Ĝardeno, al Arta Muzeo, al Filharmonio, intelektaj ludoj en Odessa junulara E-klubo "Verdaĵo" kaj en studenta klubo de Politeknika Universitato.

(Tatjana Auderskaja)



Geknaboj sin ekzercantaj per akrobataĵoj

Fotoj de LI NAN


La loĝantoj de Liaocheng en Shandong-provinco ŝatas akrobataĵojn. La urbo sendis al diversaj lokoj de la lando altnivelajn akrobatojn, el kiuj multaj gajnis medalojn en landaj kaj internaciaj akrobataj-konkursoj kaj iuj eĉ fariĝis ĉampionoj.

Akrobataĵ-ludo estas peniga. Tian lertecon oni eklernas en la infaneco. Frumatene la geknaboj, gvidataj de siaj severaj instruistoj, komencas ekzerci sin per transkapiĝo, staro sur la manoj ktp. Ĝenerale, la ekzercado daŭras ĉiutage dekelkajn horojn.

Bone sciante, ke post tri-jara lernado de akrobataĵ-ludo nur la elstaraj povos eniri en akrobatan teamon, la geknaboj venintaj el la kamparo sin ekzercas ĉiam diligente. Ili kredas, ke nur diligenteco kondukas al sukceso.






Ekzercado




1. Gefratoj en ekzercado
2. Ekzercado eĉ dum ludo de kartoj
3. Ĉiutage ili sin ekzercas per ŝtaro sur la manoj.
4. Eĉ en dormoĉambro ili sin ekzercas.
5. Li bone faras ĉiun movon kun helpo de instruisto.








Kia serioza ekzercado!



Diligenteco kondukas al sukceso.



"Kiel forta mi estas!"

Alpistoj sur la plej altaj montpintoj de la sep kontinentoj

Teksto de ZHAO XI

Fotoj de LI ZHIXIN

La 23-an de junio 1999, sur Jaya, la plej alta montpinto de Oceanio, ĉinaj alpistoj Li Zhixin kaj Wang Yongfeng, telefonis al la Ĉina Alpisma Asocio por konigi, ke ili sukcese surgrimpis la plej altajn montpintojn de la sep kontinentoj.

En 1988 la Ĉina Alpisma Asocio decidis, ke Li kaj Wang plenumu la grimpadon de la plej altaj montpintoj de la mondo: Qomolangma en Azio, Vinson en Antarkto, Mckinley en Norda Ameriko, Aconcagua en Suda Ameriko, Elbrus en Eŭropo, Kilimanĝaro en Afriko kaj Jaya en Oceanio.


Antaŭ 15 jaroj, kiel studentoj de Wuhan-universitato, ili aliĝis al la alpista grupo kaj amikiĝis en grimpadon de Animaqing-monto. Ĉi-foje la tasko grimpi la plej altajn montojn de la mondo denove kunigis ilin. La kuraĝo de Li kaj la persisteco de Wang kondukis ilin al sukceso. Dum ilia grimpadon de Mckinley en 1992 laŭ la plej malfacila itinero sur ĝia okcidenta flanko, forta ŝtormo trafis ilin. Ili alterne grimpis, protektante sin reciproke. Kiam ili trapasis meznombre 60-gradan krutan deklivon kun diferenco de alteco de 300 m., Li Zhixin havis viziojn pro laco. Tio estas danĝera por alpistoj, sed sub la helpo de la kolego li fine atingis la montpinton. Dank' al reciproka helpo ili sukcese surgrimpis tiujn montpintojn unu post alia.



Li Zhixin en paŭzo dum grimpadon de Mckinley





Wang Yongfeng sur Qomolangma (en 1993)



Sur Jaya (en 1999)



En grimpado
de Vinson



Li Zhixin en
grimpado de
Elbrus



Sur Elbrus



Dum grimpado de Mckinley



Li Zhixin sur Kilimanĝaro (en 1998)



Antaŭ la stabejo ĉe Mckinley

Ĝino-aj vestoj



Fotoj de LIU SIGONG kaj ZHANG RONGJUN

La ĝino-oj, unu el la plej malgrandaj nacimilitoj de Ĉinio, vivas en arbaroj de Xishuangbanna, sudokcidenta parto de Ĉinio. Nun en Ĉinio estas malpli ol 20 mil ĝino-oj. Ili vestas sin per apartaj vestoj kun apartaj ornamaĵoj. Ĝenerale, la viroj portas blankan aŭ nigran kaptukon, jakon el blanka dreliko kun ruĝaj strioj kaj pantalonon el maldelikata nigra

katuno. La virinoj, ĉu junaj ĉu maljunaj, portas blankan aŭ nigran tri-angulan ĉapon kun ornamaĵoj el diverskoloraj lanoj, blankan, bluan aŭ nigran jakon borderitan per diversaj desegnoj. La jakoj de fraŭlinoj havas romban ornamaĵon kun diversaj strioj sur la brusto kaj iuj havas diversajn arĝentajn ornamaĵojn. Ĉiuj virinoj portas mallongan jupon el nigra dreliko kun diversaj strioj kaj nigrajn krubendojn kontraŭ hirudoj en ĝangaloj.



Junaj ĝino-oj en te-ĝardeno



Ĝino-ino en nacia vesto



Geamantoj



Fratinoj



Ĝino-a knabino



Laboruloj





Brodajoj sur la dorso de la vesto



Maljuna ĝino-o

Junaj ĝino-oj
en festaj
vestoj

Bela kaj riĉa Taiwan

En Taiwan ĉiuj parolas en la komuna ĉina lingvo, kaj mi havas nenian malfacilon en kontakto kun la tieaj homoj

Teksto de LAO BAI
Fotoj de LAO BAI
kaj XU MINGQIANG

TAIWAN kun la pejzaĝoj belaj kaj klimato agrabla estas la plej granda insulo de Ĉinio. Rigardate de aviadilo, la insulo impresas kiel giganta salika folio flosanta sur maro sudoriente de Ĉinio. Konsistante el 86 insuloj, kiaj la insulo Taiwan, insularo Penghu kaj aliaj malgrandaj insuloj, Taiwan rigardas al Pacifiko oriente kaj najbaras al Bashi-markolo sude. Kun totala areo de 36 000 kvadrataj kilometroj ĝi estas la provinco kun plej multaj insuloj de Ĉinio. Ĝi posedas 21 milionojn da loĝantoj, el kiuj pli ol 90% vivas sur la insulo Taiwan.

En la pasintaj dekelkaj jaroj mi trifoje vizitis la provincon kaj ĉiufoje min ravis kaj kortuŝis ĝiaj belaj pejzaĝoj kaj popolaj moroj.

SUR ALI-MONTO

En Taiwan cirkulas popola kanto:

Knabinoj de Ali-monto belas flore,

Knaboj la tieaj fortas monte.

En Ĉinio oni rigardas Ali-monton kaj Riyue-lagon en la mezo de la insulo kiel simbolojn de la provinco. Taiwan estas montoza kaj Ali — unu el la kvin grandaj montoj de la insulo. Ali ampleksas 18 montpintojn, el kiuj la plej granda havas altecon de 2 500 m. super la marnivelo. Ĝi pejzaĝojn sur ĝi estas unu el la turismaj programeroj entreprenataj dum multaj jaroj. Tie funkcias




Nubomaro sur Ali-monto

montgrimpa fervojo pli-ol-80-jara. Estas interese ĝui la pejzaĝojn per montgrimpa trajno, kiu supreniras laŭ ŝtala dentrelo. Dum la malpli-ol-unu-hora veturado la turistoj povas sperti klimaton kaj pejzaĝojn de la

tropika, subtropika, varmeta kaj frosta zonoj. Jen nuboj leviĝas el montovaloj kaj ŝvebas laŭ vento; montpintoj kaj arbaroj jen aperas, jen malaperas malproksime, kvazaŭ en senlima nubomaro.

"Sovaĝaj salikoj"




ĈE RIYUE-LAGO

Riyue-lago situas en montaro. Matene, antaŭ ol la suno leviĝas el montvalo, maldensa nebulo ŝvebas super la smeralda lago. Ĉe sunsubiro ĉarmas bela vesperruĝo kaj la montoj speguliĝas en la lago, kvazaŭ belaj pentraĵoj en la akvo. La lago 30 m. profunda kovras entute 900 hektarojn sur la loko 760 m. alta super la marnivelo. En la lago estas malgranda insulo, kiu dividas la lagon en du partojn: unu havas la formon de novluno kaj la alia tiun de suno. Ĉar en la ĉina lingvo la ideogramo kun la signifo de suno prononciĝas kiel *ri* kaj tiu de luno kiel *yue*, tial oni nomas ĝin Riyue-lago, kiu ĉiam allogas al si multege da turistoj.

KANJONO DE TAILUGE

En aŭtuna tago mi venis al la turisma loko Tailuge en la orienta parto de Taiwan. Oni diris al mi, ke la orienta parto de Taiwan estas agrikultura bazo, kiu abunde produktas rizon, sukerkanojn kaj arakidojn. Krome la loko riĉas ankaŭ je multaj minaĵoj, precipe je natura marmoro. La ĉefa pejzaĝo de Tailuge estas marmora kanjono 20 km. longa. Tie ĉe montpintoj ŝvebas nuboj, sur monttalioj fluas rojoj kaj inter montoj profundas valoj. Al nia aŭto baris la vojon klifo. Mia kunvojaĝanto diris al mi, ke tie estas multe da ŝtonaj grotoj kaj ofte flugas hirundoj por fari neston kaj serĉi manĝaĵojn, pro tio la loko portas la nomon Hirunda Buŝo. Mi vere vidis, ke dekoj da hirundoj, ĝoje pepante, ŝvebas super grotoj. Ni daŭrigis la vojon kaj atingis faŭltan krutaĵon je 1 600 m. altan super la marnivelo, riskoplenan lokon de la kanjono. Ĝia supro estas tute kalva kaj malsupre de ĝi muĝas akvo, frapiĝante kontraŭ buntaj marmoraj blokoj. Ni piede eniris en larĝan tunelon laŭ artefaritaj



En Kanjono de Tailuge



Riyue-lago




Templo de Civitaj kaj Militistaj Korteganoj ĉe Riyue-lago



Ĝemelaj pavilonoj sur Ali-monto





Tailuge-parko

koridoroj. Por oportunigi la turistojn en vizitado, oni faris multe da grandaj fenestroj sur grotmuroj, kiuj estas taŭgaj kaj por enlasi lumon kaj aeron kaj por birdovido al la abisma valo. En la valofundo la akvo batas rokegojn kaj estigas animskuan muĝadon.

POPOLAJ MOROJ

Inter Taiwan-provinco kaj la ĉeftero de Ĉinio kuŝas markolo. La nunaj loĝantoj de la provinco devenis ĉefe de Fujian-kaj Guangdong-provincoj, tial

taiwan-anoj plejparte parolas sud-fujian-an dialekton kaj malmultaj parolas keĵia-an dialekton de Guangdong, tamen pro longdaŭra popularigo de la komuna ĉina lingvo *putonghua*, ĝi jam vaste uzatas tra la tuta provinco. Nun en Taiwan radio-kaj TV-stacioj elsendas ĉefe en *putonghua*. Mi estas nordano kaj ne scias la fujian-an dialekton nek la guangdong-an. En Hongkong kaj Makao oni ĉiam parolas guangdong-an dialekton kaj pro tio mi havis grandan malfacilon en interparolo kun la tieaj loĝantoj

Gravurado de totemo



Geknaboj de Ali-monto

kaj iam devigite komuniĝis kun ili per skriba lingvo. Nur en la lastaj jaroj ili eklernis *putonghua*, tamen en Taiwan ĉiuj parolas *putonghua*, kaj mi havas nenian malfacilon en kontakto kun la tieaj homoj.

Iu oldulo diris al mi, ke kvankam markolo apartigis Taiwan for de la ĉeftero de Ĉinio, tamen iliaj popolaj moroj estas preskaŭ la samaj. Antaŭvespere de la Printempa Festo oni okazigas ceremonion por kulti la prapatrojn kaj la tuta familio kune vespermanĝas por ĝui la familian feliĉon. En la festivalo Brilo kaj Klara (la 4-an aŭ 5-an de aprilo) oni vizitas tombon memore al la prapatroj. La 9-a de la naŭa monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas Festo de Maljunuloj. Same kiel en aliaj lokoj de Ĉinio oni ĉiam instruas, ke la homoj devas respekti la maljunulojn kaj estimi la talentulojn. En la popolaj festoj oni sin amuzas per stilzirado, drak- kaj leonodancoj. En la 5-a de la kvina monato laŭ la ĉina luna kalendaro oni manĝas gluecan rizaĵon volvititan en fragmitaj folioj memore al la antikva patriota poeto Qu Yuan, faras drak-boatan konkurson k.a. Ĉiuj ĉi popolaj aktivadoj manifestas



Gaŭŝan-ino teksanta ŝtofon per tradicia maniero

la tradician kulturon de Ĉinio.

Pli ol 97% de la loĝantoj de Taiwan estas hanoj kaj la tieaj nacimalplimultoĵ ĉefe estas gaŭŝan-oj, kiuj, kiel indiĝenoj, loĝas de longe en montaroj kaj eĉ hodiaŭ rezervas siajn originalajn morojn kaj parolan lingvon, tamen mankas al ili skriba lingvo, dum junaj gaŭŝan-oj plejparte parolas *putonghua*. Pro diferenco de la lokoj, kutimoj kaj lingvoj, la gaŭŝan-oj dividas sin en 9 grupojn, iuj el ili observas klanajn trajtojn eĉ hodiaŭ. Ili formas tribon en montaroj kun la avino kiel la ĉefo kaj observas la matriarkajn regulojn.

TAIBEI KAJ GAOXIONG HIERAŬ KAJ HODIAŬ


Taibei estas ĉefurbo de la provinco Taiwan kaj ankaŭ ĝia politika, ekonomia kaj kultura centro. En la urbo kun areo

de 270 kvadrataj kilometroj staras domoj ne nur modernaj, sed ankaŭ tradiciaj ĉin-stilaj kun pentritaj traboj kaj gravuritaj kolonoj. La grandioza Muzeo de la Imperiestra Palaco en Taibei vidigas fortajn naciajn trajtojn. En tiu prospera urbo la komercado estas vigla kaj la popola vivo kompare bona.

Gaoxiong estas la dua granda urbo de la provinco kaj ankaŭ ĝia suda pordo. Se oni veturas aviadile de Taibei, do post 40 minutoj oni atingas Gaoxiong, sed aŭte oni bezonas 4 horojn por fini la saman vojaĝon. La stratoj en Gaoxiong estas pli larĝaj kaj longaj ol tiuj en Taibei. Kun altaj kokosujoj kaj prosperaj deloniksoj (*Delonix regia*) en Gaoxiong ĉiam regas tropika klimato.

Mia amiko, s-ro Shi, diris al mi, ke jam en 1863 Gaoxiong estis malfermita kiel komerca


haveno, kiu plej frue faris negocajn aferojn kun ĉemaraj lokoj de la ĉeftero de Ĉinio. Kiel unu el la 10 plej grandaj havenoj en la mondo, ĝi posedas nun 122 dokojn kun jara en- kaj elŝipiga kvanto de 70 milionoj da tunoj. Gaoxiong funkcias ankaŭ kiel grava industria urbo de la provinco. Tie estas rafinejo de petrolo, ŝtalejo kaj ŝipfarejo. Gaoxiong estas ankaŭ turisma centro en la suda parto de la provinco. Foje mi kaj s-ro Shi grimpis Wanshou-monton 360 m. altan super la marnivelo. Starante sur la plej alta monto de la urbo, mi rigardis orienten kaj vidis multe da ĉielskrapantoj kaj kiam mi turnis mian rigardon okcidenten, en mia vidkampo aperis senlima maro. Mi scias, ke trans la maro estas Fujian-provinco, kiu strikte ligiĝas kun la insulo Taiwan per blua akvo. ■



La lernejo sur ŝipoj



Leciono de aritmeiko



Remado estas deviga leciono.

Lernejo sur ŝipoj

La lernejo estas duetaĝa domo sur du grandaj cementaj ŝipoj kunligitaj, kiuj fiksiĝas de kvar pezaj feraj ankroj en la mezo de la lago

de PANG NAIYING

LI ĉiam estas ĝojaj, precipe kiam ili kantas “Knaboj sur akvo”:

*Sur la lago Honghu flosas
nia hejmo,
sur la lago Honghu tangas
la lernejo.*

*Renkonte al matenruĝo,
remas ni al la lernejo...*

La elementa lernejo sur la lago Honghu estas “gaja insulo”

de la fiŝistaj geknaboj. Tiaj lernejoj estas malmultaj en Ĉinio. Ĝi estas duetaĝa domo sur du grandaj cementaj ŝipoj kunligitaj, kiuj fiksiĝas de kvar pezaj feraj ankroj en la lago. En senventaj tagoj ĝi estas stabila. Ĝi havas klasĉambrojn, oficejon, sanitaran servon, instruistan loĝejon kaj butikon. En la dua etaĝo estas platformo de 360 kvadrataj metroj kun balustrado, kie la infanoj povas havi surteran sperton, ekz.

ŝnursalto, ŝnurtirado, korpo-ekzercado kaj saluto al hisata nacia flago per manlevo. Sed tie ili ne povas ludi futbalon, flugpilkon aŭ korbopilkon. La granda lago apartenas al la infanoj. Naĝo kaj remad-konkurso en somero elmontras ilian talenton.

Estas kviete sur la ŝipoj. Iras leciono. En ĉiu ĉambro estas du klasoj: unu lernas kaj la alia faras ekzercojn, alterne kaj ne



ĝene. Tia instruado taŭgas por la surŝipa lernejo, kiu ne havas multajn lernantojn de kompletaj klasoj nek multajn klasĉambrojn kaj instruistojn. Nur 4 lernantinoj lernas en la sesa klaso. Ili estas diligentaj. Mi legis la inspiron el iliaj belaj manskriboj kaj flua stilo. Iliaj gepatroj fieras pri tio, ĉar la prapatroj, analfabetaj, devis peti aliajn skribi leteron.

Malalta knabo Yan Deguang de la kvina klaso portas eŭrop-stilan kostumon. Mi demandis, kie li loĝas. Li montris foren, kie ŝajne troviĝis ŝipo. Li diris, ke li komencis remi al la lernejo, kiam li estis lernanto de la unua klaso, tio estis tre facila; se li povos direkti estonte grandan vaporŝipon, tio estos eksterordinara.


Tiu, kiu povas prami de la lago Honghu al oceano, estas la "ŝipo de scioj". La ĉefinstruisto diris, ke la surŝipa lernejo havas 20-jaran historion, sed komence nemalmultaj geknaboj ĉesigis sian lernadon, ĉar kiam venis la sezono de fiŝkaptado, ili devis helpi sian familion. Poste iuj revenis kaj aliaj restis en aliaj provincoj. En la lastaj jaroj fiŝistoj fiksis sian hejmon por breedi fiŝojn, kaj la geknaboj neniam

ĉesigis sian lernadon kaj daŭrigis la vojon — iuj ekvizitis mezlernejon aŭ universitaton.

En granda brila klasĉambro, mi rimarkis 4-5-jarajn gaje ludantajn infanojn kun kolora savjako. La instruisto diris, ke ili estas en infanĝardeno kaj de apenaŭ unua klaso. Denaske moviĝemaj, ili antaŭe estis enfermitaj en sia hejma ŝipo, kaj tio malfruigis la disvolvon de ilia intelekto. Nun la grupa ludo estas granda liberigo de la infanoj.


La elementa lernejo bonvenigas ankaŭ plenkreskulojn. Vespere infanoj foriras kaj plenkreskuloj venas. La instruistoj instruas kaj abocan kaj fakajn sciojn al la plenkreskuloj. Ili montras la malutilon de senĉesa fiŝkaptado en la lago kaj la gravecon de prosperigo de la lago. Iu krabobreda riĉulo diris, ke en la lago Honghu la krabo de Liaojiang estas 50 gramojn peza, sed tiu de Yangzi 250 gramojn peza, kaj la scion li ŝuldis al la lernejestro, kiu instruis kiel distingi la specojn de kraboj.

La 25-jara lernejestro Hu Jie estas familiare nomata de la fiŝistoj "anaso n-ro 1". Li lernis akvoproduktaĵan bredadon en universitato. Kiel juna volontulo,



Gimnastika ekzercado sur la ŝip-platformo

Vespera leciono por plenkreskuloj





li fariĝis instruisto tie, post kiam li diplomiĝis en julio 1998. La ŝarĝo estas peza kaj la kondiĉoj malbonaj kompare kun lernejoj sur la tero. Li firmigis sian volon pro malgranda okazaĵo. Iutage pluvis, kiam la infanoj estis forlasantaj la lernejon. Li ŝirmis la ŝipeton de la infanoj per granda ombrelo. Sed neniu el la lernantoj sidis sub la ombrelo. Ili tenis la librosakojn ene kaj ĉirkaŭis ilin. La pluvo malsekigis ilian korpon.

La okazaĵo kortuŝis la tieajn instruistojn, kiuj diplomiĝis de normala lernejo. Komence ili ne kutimis al tanganta ŝipo kaj ofte kaptumiĝis aŭ vomis. Do ili trovis floson, staris sur ĝi kaj balancis ĝin. Ĝis ili kutimiĝis al la tangado. Poste ili lernis de la lernantoj

remi kaj naĝi, fine la "teraj anasoj" fariĝis "akvaj anasoj".

Jin Mei, ununura instruistino sur la ŝipoj, estas fianĉino de Hu Jie. Kiam mi vidis ŝin kun delikata haŭto, ŝi estis ĉirkaŭita de brunvizaĝaj infanoj. Ŝi aspektis kiel bela lotusfloro. Ŝi diris al mi, ke sur la lago Honghu ŝi komprenas, kio estas la amo de fiŝoj kaj akvo. En malbonaj tagoj la instruistoj zorgas pri la sekureco de la geknaboj kaj ankaŭ la geknaboj zorgas pri siaj instruistoj kaj volas akompani ilin. En someraj ferioj de la pasinta jaro, kiam uragano detruis 3 pezajn ĉenojn de la ankroj, la gepatroj de la lernantoj venis por helpi...

Jin Mei preparis por ni

abundan tagmanĝon. Ŝi kaŭrante lavis legomon kaj babilis kun mi sur la ŝipo. Ŝi diris, ke ili havas fiŝpladon ĉiutage, ĉar la preterpasantaj fiŝistoj donacis fiŝojn al ili. Ĉi tiuj pakis la superflujajn fiŝojn en lotusfolion, ŝnuris ilin kaj metis ilin en la lagon. Ili lernis tion de fiŝistoj, tre gastamaj al ili. En festotago la gepatroj petis sian infanon inviti la instruistojn al sia hejmo.

La lago Honghu estas bela. En serena somera nokto brilas la luno kaj agrablas la vento. En glimado de lampiroj inter ŝipoj kaj en muziko de griloj kaj ranoj apud la akvo, la instruistoj veturigas ŝipetojn por viziti siajn lernantojn. ■

Ĉinaj dioj de riĉeco

La ĉinoj elektis la diojn ne sole laŭ la riĉaĵoj, sed pli grave laŭ iliaj virtoj kaj talentoj

de PANG NAIYING

EN la okuloj de la antikvaj ĉinoj la dioj de riĉeco estas ĉiam bonfaraj. La homoj, ĉu riĉaj ĉu malriĉaj, ĉiuj kultis la diojn kun espero, ke tiuj alportos al ili bonŝancon de riĉiĝo. En Ĉinio estis pluraj dioj de riĉeco. Iuj el ili estis dioj en legendo kaj aliaj — famaj personoj en la historio. De ilia diiĝo oni povas vidi la deziron de la ĉinoj pri riĉiĝo kaj ilian koncepton tiufланke.

DU CIVILAJ DIOJ DE RIĈECO

En la antikva Ĉinio estis civilaj oficistoj Bi Gan kaj Fan Li. Ili ambaŭ estis honestaj korteganoj kaj honoritaj kiel dioj de riĉeco.

Bi Gan vivis antaŭ pli ol 3 000 jaroj. Li estis onklo de reĝo Zhou de Shang-dinastio. La reĝo estis despota kaj diboĉa, kaj Bi Gan ofte deadmonis lin de fiagoj kaj fine kolerigis lin, kiu ordonis detranĉi ties koron.

La popolanoj riĉiĝas nur tiam, kiam honestaj oficistoj estas en potenco. Se monavidaj oficistoj estas favorataj, la popolanoj certe vivas mizere. La ĉina popolo opinias, ke Bi Gan estis honesta kaj malegoisma, kaj post la morto li, senkora, fariĝis pli grandanima kaj maltima, tial li estis la plej ideala homo por esti dio de riĉeco.

Fan Li estis tre saĝa ŝtatooficisto de Yue-regno en la lasta periodo de Printempo kaj Aŭtuno (722-481 a.K.). Dank' al lia helpo, la reĝo de Yue-regno venkis la malamikojn kaj gajnis hegemonion. Kiam la reĝo

premiis la meritajn subulojn, Fan Li foriris aliloken. Poste li skribis al sia amiko, por ke ankaŭ ĉi tiu foriru el Yue. En la letero li skribis: “Nuliĝas la birdoj, kaŝiĝas la pafarko; mortas la leporoj, kuirigas la leporhundo. Oni povas dividi nur la malfeliĉon kun la reĝo de Yue-regno, sed neniam la feliĉon. Se vi ne foriros, vi estos mortigita de li.” Lia amiko rifuzis la admonon kaj fine estis ekzekutita de la reĝo.

Fan Li kaŝnome komercis en Qi-regno kaj riĉiĝis post nur kelkaj jaroj. Li diris: “En la politika sfero mi estis altranga oficisto kaj post la demisio mi multe riĉiĝis de komercado. Tio ja ne estas bona afero.” Li do filantropie helpis la malriĉulojn. Kaj post tio li iris al urbo kun facila trafiko kaj vigla komerco. Li proponis, ke kiam la prezo de greno estas malalta, la registaro aĉetu multe da ĝi kaj, kiam ĝia prezo leviĝas, la registaro vendu ĝin je ne tre alta prezo por faciligi la popolan vivon kaj eviti la malsaton. En la negoco li ĉiam vendis bonkvalitajn varojn je malalta prezo, observante la principon de malgranda profito kaj granda vendo. Post kelkaj jaroj li havis miriadon da taeloj da arĝento. Li donacis multe el sia havaĵo al la malriĉuloj... Ankaŭ liaj posteuloj imitis lin kaj lia familio daŭre prosperis.

Antaŭe la ĉinoj diris, ke ĉiuj komercistoj estas malhonestaj, sed Fan Li estis escepto. Li komercis honeste, donacis malavare kaj fariĝis bona dio de riĉeco en la okuloj de la ordinaraj ĉinoj. Eĉ hodiaŭ en multaj restoracioj kaj vendejoj vidiĝas tia aforismo: “Komercu honeste por profiti

konstante; konsideru virton kaj profiton samtempe por riĉiĝi por eterne.” Oni opinias, ke plimultiĝo de bonkoraj riĉuloj estas utila al la malriĉuloj.

RIĈIGA INFANO

La supre diritaj du dioj estas en vestoj de civilaj oficistoj, kiel montras iliaj portretoj. La diferenco estas nur ke Bi Gan estas miene serioza, dum Fan Li — afabla. Tamen ilia virto estas malfacile pentrebla. Ĝenerale oni scias, ke ili estas dioj de riĉeco, sed ne scias, kial ili fariĝis tiaj dioj.

Laŭdire la Riĉiga Infano povas konigi la riĉigan metodon al tiuj, kiuj deziras riĉecon, sed ne konas la vojon. Tiu idolo



Riĉiga Infano

estis pentrita tia, ke li radias de ĝojo kun manoj tenantaj rulon da kaligrafiaĵoj kun la signifo “riĉiĝo de afableco”. Sur lia kapo estas muso kun dia frukto en la buŝo, sur kiu estas ideogramoj

kun la signifo “laŭ via volo”. La pentraĵo aludas, ke oni riĉiĝas de afableco. Se vi agas tiel, via deziro realiĝos.

La Riĉiga Infano estis fama intelektulo Cheng Hao (1032-1085) de la Norda Song-dinastio. Oni diris, ke lia infana vizaĝo devenis de lia persista memkulturado. Li estis ŝtatoficisto kaj pro malkonkordo kun la kortega politiko li estis malpromociita kaj pelita al malriĉa landlima regiono. Tie li estis malĝoja tuttage kaj ofte iris al budhisma templo por ludi ĉinan ŝakon kun maljuna bonzo. Foje, kiam ili finis la ludon, jam vesperiĝis, kaj la bonzo tranoktigis lin en la templo. En la profunda nokto li estis vekita de bruo. Li ellitiĝis, bruligis kandelon kaj vidis, ke muso eliris libron el la umbiliko de budha statuo. La libro temas ekskluzive pri memkulturo. Cheng Hao komencis sin kulturi laŭ la libro, forgesante la gloron kaj humiliĝon en la homa mondo. Tiamaniere li memkulturis pli ol unu monaton kaj lia vizaĝo fariĝis infaneca. Post nelonge lia disĉiplo vizitis lin kaj rimarkis, ke li, silente sidante kvazaŭ budho, traktas aliajn afable kaj milde. Poste oni diris, ke ĉiuj arĝentaĵoj, kiujn li tuŝis, fariĝas oraj, kaj mildeco kaj afableco kaŭzas tion kaj kondukas al riĉiĝo.

Evidente, la diro admonas, ke komercistoj ne arogantu de granda profito nek malpacientiĝu de defecito, sed ĉiam kaj ĉie estu kvietaj, ne faru tro detalan kalkulon en la vendado, sed ĉiam estu afablaj al la klientoj, nur tiamaniere ili povas prosperi en la negoco, dum tiuj, kiuj trompas klientojn kaj tiranas en la negoco, certe malsukcesos en sia kariero.

MILITISTAJ DIOJ DE RIĈECO

Se oni diras, ke la civilaj dioj de riĉeco estas saĝosako de riĉiĝo, do la militistaj estas ĝia

gardantoj. En Ĉinio cirkulas mito: Marŝalo Zhao Gong kun fera ĉapo sur la kapo kaj akra spado en la mano, rajdanta sur nigra tigo, ĉiam gardas la popolon kontraŭ rabistoj kaj ŝtelistoj kaj ĉiaj katastrofoj.

La popola mito diras, ke kvankam Marŝalo Zhao Gong iam subigis drakon kaj kvietigis maron, tamen li ne distingis virton de malvirto, helpis la tiranon Zhou de Shang-dinastio en despotado. Por ke li sin korektu, la nobla Jiang Ziya faris pajlan ĉifonfiguron kun la nomo Zhao Gong kaj metis ĝin sur altaron, bruligis la magian



Militista dio de riĉeco

desegnaĵon, murmuris sorĉvortojn kaj per arko pafis la okulojn kaj koron de la ĉifonfiguro. Pro tio mortis la malica dio Zhao Gong. Post sia morto li gvidis 4 malgrandajn diojn zorgantajn pri favora aŭspicio de la komercado, allogo de riĉaĵoj kaj havigo de trezoro. Dank’ al liaj novaj bonfaroj la popolo ne plu konsideris liajn antaŭajn krimojn kaj honoris lin per la titolo “Marŝalo Zhao Gong” kaj en la kvina tago de la unua monato laŭ la luna kalendaro oni kultis lin per bongustaĵoj por soleni lian naskiĝtagon cele riĉiĝi en la nova jaro.

Guan Yu estas pli estimata ol Zhao Gong. Li (?-219) estis

brava generalo de Shu-regno. Pro siaj grandaj meritoj en la bataloj li estis alte respektata. Foje li iris sola partopreni bankedon okazigitan de la malamikoj. Travidinte la insidon de la malamikoj, li ŝajnis sin ebria, kunportis ostaĝon kaj sin liberigis el la danĝero.

Post lia morto oni diigis lin kaj honoris lin per titoloj “Granda Dio Subiganta Ĉiujn Diablojn” kaj “Sankta Militisto” kaj konstruis multajn templojn memore al li. Oni ofte faris aŭguradon en la templo por antaŭscii la personajn, familiajn kaj eĉ ŝtatajn aferojn. Multaj popolaj bankoj kaj lombardejoj rigardis lin kiel gard-dion kaj gluis lian portreton sur pordo aŭ meze de la centra ĉambro. Ili kredis, ke li estas kapabla en gardado de komercistoj, konduko al riĉiĝo kaj forpelo de ĉiaj fiuloj.

La 13-a de la kvina monato laŭ la luna kalendaro estas tago de pluva festo de la ĉinoj. Oni diris, ke tio estis la tago, kiam Guan Yu iris al la malamika bankedo kun granda glavo. Ĉe lia foriro la ĉieldio faligis pluvon, por ke li akriĝu sian glavon. Diiĝinte, li ĉiam akriĝis sian glavon en tiu tago por mortigi la diablojn kaj kultu la ĉieldion. Hazarde, en tiu tago la diablo de trosekeco eliris kaj Guan Yu renkontis lin kaj mortigis lin, pro tio pluis, kaj dank’ al tio la popolo akiris riĉan rikolton. Ĉinaj kamparanoj diris, ke trosekeco ĉiam haltas en la 13-a de la kvina monato, kaj nomas la pluvon en tiu tago tiu de Guan Yu por akriĝi sian glavon.

El tio vidiĝas, ke en Ĉinio ĉu la civilaj, ĉu la militaj dioj de riĉeco havas ĉiu siajn proprajn travivaĵojn. La ĉinoj elektis la diojn ne sole laŭ la riĉaĵoj, sed pli grave laŭ iliaj virtoj kaj talento. De tio ni scias, ke la ĉinoj kultas la diojn de riĉeco surbaze de profunda socia fono kaj kultura origino, sed ne sole surbaze de superstiĉo. ■

"Portista armeo" de Chongqing

Pro kruteco de la vojoj tre malofte videblas en Chongqing bicikloj kaj tricikloj. Por transporti grandajn varojn, kiaj televidilo kaj lavmaŝino, la urbanoj preferas dungi portistojn ol lui kamionon, kiu postulas grandan pagon. Tial nun la portistoj jam fariĝis nemankigeblaj en la vivo de Chongqing-anoj.

Teksto de XIE CHEN

Fotoj de ZOU YI

Sur stratoj de la urbo Chongqing de Sichuan-provinco oni ofte vidas virojn kun vekto kaj ŝnuro en la manoj. Lokanoj konigis, ke ili estas portistoj.

La portistoj grandparte venas el la kamparo de la antaŭurbo de Chongqing. Ili en nombro de pli ol 100 mil estas nomata "portista armeo".

Ŝnuro kaj bambua vekto estas iliaj laboriloj.

Chongqing

estas monta urbo. Ĝiaj multaj konstruaĵoj staras sur montdeklivoj. Pro kruteco de la vojoj tre malofte videblas tie bicikloj kaj tricikloj, vaste uzataj en aliaj urboj. Por transporti grandajn varojn, kiaj televidilo kaj lavmaŝino, la urbanoj preferas dungi portistojn ol lui kamionon, kiu postulas grandan pagon. Tial nun la portistoj jam fariĝis nemankigeblaj en la vivo de Chongqing-anoj.

La bambua vekto de portistoj estas admirinda, ke ĉiujn varojn, ĉu grandajn ĉu malgrandajn, ili povas porti per ĝi. Kiam unu portisto ne sufiĉas, li venigas du aŭ tri helpantojn. Sur strato oni ofte vidas, ke portisto kun 100-200 kg. da varo rapide iras kaj post ili la dunganto

aŭ kuretas aŭ veturas per taksio al la celloko por atendi sian varon, tute ne timante, ke la honesta portisto forportos aŭ difektos la varon. Kvankam en Chongqing vojoj estas deklivaj, kaj la portistoj devas supreniri laŭ ŝtuparo ŝarĝite, tamen en iliaj facilaj paŝoj mi vidas la persistecon kaj eltenemon de Sichuan-anoj.

"Portista armeo" ekzistas de multaj jaroj. Ĝenerale la portistoj ne estas parolemaj, sed pacaj inter si kaj malofte marĉandas kun dunganto. Ili aŭ solaj venas al la urbo aŭ kelkope el la sama vilaĝo. Kvankam ili grandigis la troloĝatecon de la urbo, tamen

la urbo ne rifuzas ilin, ĉar ili ne malhelpas trafikon nek atencas publikan sekurecon, male ili donas oportunecon kaj al klientoj kaj al vendistoj. Estas mirinde, ke ankaŭ en konstruejoj de la urbo aperis "portista armeo", kiu per siaj fortikaj ŝultroj kontribuas al konstruado de novaj domoj de Chongqing-anoj.

Multaj portistoj ne longe restas en la urbo. Ili revenos hejmen post 3-5 jaroj. Iu portisto diris, ke liaj patro kaj fratoj laboras en kamparo, tamen por li la ekstera mondo estas interesa, kaj se li havos sufiĉe da mono, li vizitos korespondan kurson pri agronomio. "Kiel oni povos bone fari kamplaboron, se oni ne posedas sufiĉe da sciencaj scioj?" li diris.





Fragmentoj el mia vizito en Japanio (I)

... malgraŭ la hezito kaj timo mi decidis skribi ion por konigi al niaj legantoj, kiel agas la samideanoj en nia najbara lando Japanio

de WANG SHIRONG

DANK' al la afabla invito de la Japana Esperanto-Instituto (JEI) kaj malavara financa helpo de samideanino Hagiwara Naka en Tokio, mi vojaĝis al Japanio por ĉeesti la 86-an Japanan Esperanto-Kongreson, kiu okazis de la 15-a ĝis la 17-a de oktobro.

Kion mi raportu al la legantoj de EPC? Mi longe hezitis antaŭ ol preni la plumon timante, ke mia raportaĵo estos ŝablona ripetaĵo aŭ plagiataĵo de la raportoserio de s-ro Wang Hanping, kiu gastis en Japanio oktobron de 1998 kaj aperigis sian raportoserion en sinsekvaj 5 numeroj de 1999 de EPC. Sed fine, malgraŭ la hezito kaj timo mi decidis skribi ion por konigi al niaj legantoj, kiel agas la samideanoj en nia najbara lando Japanio.

SENMANKE PREPARITA KONGRESO

La 86-a Japana Esperanto-Kongreso okazis en la bela sezono kaj havis la ejon en bela loko, malgranda urbo Motizuki en montaro de la gubernio Nagano, kiu distancas de Tokio centojn da kilometroj.

La kongreso havis la lokon en la urbodomo de Motizuki, moderne ekipita grizeta konstruaĵo.

Mi veturis de Tokio al Motizuki per superekspreso Sinkansen (Nova Trunka Linio). Post veturado per trajno kaj aŭtobuso mi atingis la kongresejon.

Mi eniris en la akceptejon de

la kongreso kaj estis infektita de gajeco de la samideanoj. Multaj el ili, kiuj antaŭe vizitis Ĉinion, salutis min kaj petis min transdiri ilian saluton al iliaj konatoj en Ĉinio. Por neniun komision forgesi, mi notis iliajn salutojn en mian kajeron, kaj kompreneble mi fidele plenumis ilian peton post mia



S-ino Hagiwara Naka kaj la aŭtoro

reveno al la hejmo. Kun granda ĝojo mi renkontis la samideanojn, kiujn mi tre sopiris pro ilia sincereco kaj simpatio al la ĉina movado.

Ĉirkaŭ 300 samideanoj, inkluzive de partoprenantoj el Aŭstralio, Ĉinio, Germanio, Koreio, Usono kaj Vjetnamio, kolektiĝis en la bele iluminita ĉefhalo por atendi la solenan komencon de la inaŭguro. En la 16-a kaj 20 minutoj solene malfermiĝis la inaŭguro. S-ro Izumi Yorimiti kaj s-ino Koyama Kiroko gvidis la ceremonion. Post la emocia kantado de "La Espero" honora prezidanto, grandaĝa avo Kobayasi Tatue de Motizuki, salutis la kongresanojn. Li estis 103-jara, sed aspektis sana kaj pli juna ol li efektive estis. En sia juneco li lernis Esperanton, sed iom post

iom forgesis la lingvon. Kiam JEI decidis havi kongresejon en Motizuki, li relernis la lingvon kaj mem faris bonvenigan saluton:

Saluton!

Mi vivis cent tri jarojn!

Mi vivis militajn jarojn!

Mi esperas pacon.

Ĝojo, bela dia lumo,

vi filino de l' ĉiel'

fratoj estos ĉiuj homoj,

kiujn tuŝas via fort'.

Vivu Esperanto!

Mi admiris lian bonfarton en tiom granda aĝo. Sendube la freŝa aero, la purega akvo kaj la paca atmosfero de la loko faras la Motizuki-anojn sanaj kaj longevivaj.

La kongreson salutis urbestro de Motizuki, reprezentantoj de Koreio, Vjetnamio kaj Ĉinio. La kongreson letere gratulis la mongola ambasadoro kaj prezidanto de la Kolombia Esperanto-Ligo. Ambaŭ kortuŝite laŭdis la agmanieron de la japanaj samideanoj en ilia fervora dissemado de Esperanto en iliaj landoj.

Kiel komisiito de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) mi legis ĝian salutmesaĝon. Antaŭ tio mi improvize salutis s-ron Kobayasi Tatue, kun kora deziro, ke li vivu ankoraŭ 103 senmilitajn jarojn.

En sia mesaĝo ĈEL alte taksis la gravan rolon de la japanaj samideanoj en E-movado en la sfero de Azio kaj la tuta mondo. Esperanto-movado en Japanio estas tre vigla kaj havas longan historion. Dum multaj jaroj inter la ĉinaj kaj japanaj esperantistoj estas ofta, fruktodona kaj amika kunlaboro. ĈEL sincere deziris plenan sukceson al la kongreso.



En la kongresejo

Kiel kutime, dum la kongreso okazis multaj fakkunsidoj, kaj mi ĉeestis la fakkunsidon de Azia Agado kaj tiun por aŭskultantoj de la Esperanta disaŭdigo de la Ĉina Radio Internacia, kiujn gvidis s-ro Takeuti Yosikazu. S-ro Keep Enderby, prezidanto de UEA, honoris la kunsidon per sia alesto. Li laŭdis la aktivan agadon de la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM), konfirmante, ke Esperanto bone prosperas en Azio. La sukcesa okazigo de la unua kaj dua aziaj kongresoj pruvis tion. La ĉeestantoj de la kunsido alte taksis la senlaca laboron de

gvidantoj de KAEM kaj ankaŭ tuŝis la problemon de aktuala situacio de la disvolviĝantaj landoj. Ĉe la fino oni proponis establi Azian Fondaĵon por helpi E-movadon en disvolviĝantaj landoj.

FERVORAJ AŬSKULTANTOJ DE LA ĈINA RADIO INTERNACIA

Kun kora danko mi ĉeestis la kunsidon de aŭskultantoj de la Ĉina Radio Internacia. Antaŭe tiun kunsidon prizorgis s-ino Takeuti Tomiko, edzino de s-ro Takeuti Yosikazu. Sed bedaŭrinde nia kara amikino Tomiko forpasis en 1998. S-ro Takeuti diris en granda emociiĝo, ke li daŭrigos la aferon de sia edzino, kiu fervore prizorgis tiun fakkunsidon dum multaj jaroj. S-ino Tomiko multfoje vizitis Ĉinion kaj montris grandan simpatian al la ĉina movado. En sia urbo Takatuki ŝi fondis

grupojn de aŭskultantoj kaj instigis pli kaj pli multajn homojn aŭskulti la Esperantan disaŭdigon de la Ĉina Radio Internacia. Ni neniam forgesos ŝian kontribuon al la amika interkomunikado de la ĉinaj kaj japanaj samideanoj.

En la kunsido la samideanoj donis tre bonajn konsilojn ĉu pri la enhavo, ĉu pri la lingvo de la ĉina Esperanta disaŭdigo. Ili tre ŝatas la rubrikojn "Leterkesto", "Vojaĝo", "Esperanto en Marŝo" k.a. Ili esperis, ke la radio rekomencos kurson de konversacio en la ĉina lingvo. Mi atente notis kaj surbendigis iliajn parolojn kaj transdiris ilin al miaj kolegoj en la E-sekcio de la Ĉina Radio Internacia.

Min profunde kortuŝis la faro de s-ro Terao Hiroŝi. Li komencis aŭskulti la ĉinan Esperantan disaŭdigon antaŭ 30 jaroj. En la kunsido li disaŭdigis sonregistron, kiun li faris en 1977. Kiam mi aŭdis la imponan melodion de "Ruĝas Oriento", mi ne povis reteni miajn larmojn. Kia sincereco! Kia amikeco! Mi tre ĝojas kaj fieras pro la Ĉina Radio Internacia, ke ĝi havas tiel afablan samideanon. ■

Japanaj aŭskultantoj de ĈRI kaj la aŭtoro



Posedanto de rara ĉina poŝtmarko

- S-ro Lam Manyin aĉetis ĝin per 0.3 miliono da dolaroj kaj portis ĝin al Ĉinio
- Li fariĝis nova reĝo de ĉinaj filatelistoj

de LI MIN

FINE de aŭgusto 1999 ekscitiĝis ĉinaj filatelistoj pro tio, ke okazis en Pekino la Ĉina Monda Filatela Ekspozicio de 1999, en kiu ekspoziciigis pli ol 3 000 filatelaĵoj el 111 landoj kaj regionoj. El la filatelaĵoj la plej okulfrapa estis la kvaropa poŝtmarka bloko "Hong Yin Hua" kaj la tuta folio de granda draka desegno, kiuj estas konservataj de s-ro Lam Manyin, fama filatelisto de Hongkong. Pro la unikeco de "Hong Yin Hua" ĝia posedanto estas nomata "reĝo de la filatelistoj".

NASKIĜO DE "HONG YIN HUA"

"Hong Yin Hua" antaŭe estis nomo de imposta marko de dogano. Ĝi estis presita de iu londona kompanio, en valoro de 3 cendoj, kaj la totala preskvanto estas 0.66 miliono.

En 1897, pro multiĝo de poŝtaĵoj la poŝtoŭficejo de Qing-dinastio (1644-1911) bezonis poŝtmarkon en granda valoro kaj ordonis, ke la atestilo estu ŝanĝita kiel portempa poŝtmarko.

"Hong Yin Hua" estis stampita per unu dolaro. Komence la litertipo de "Poŝto de Qing-dinastio" estis sama kiel tiu de "unu dolaro". La poŝta instanco ne kontentis pri tio kaj ordonis anstataŭigi la antaŭan litertipon per pli granda. Tiel oni nomis

la antaŭan "Hong Yin Hua de malgranda tipo". Ĝi estis konservata kiel specimeno.

S-ro Villard, germana oficisto en ĉina doganejo, respondecis pri



La kvaropa poŝtmarka bloko

kontrolo de preso de tiaj poŝtmarkoj. Fakte la malpermeso de emisio de "Hong Yin Hua de malgranda tipo" koincidis kun lia celo. Ĉar li bone konis la valoron de la difektita poŝtmarko, li intence iomete fuŝis ĝin. Je oportuno de la laboro li kaŝis 7 poŝtmarkojn, inkl. unu kvaropan poŝtmarkan blokon kaj unu poŝtmarkon stampitan.

La preskvanto de "Hong Yin Hua de malgranda tipo" estas 50, inter kiuj 10 difektiĝis. Nun ekzistas nur 32.

Kun diversaj rakontoj ili travivis jarcenton.

HISTORIO DE "HONG YIN HUA"

El la poŝtmarkoj de malgranda tipo la plej fama estas la kvaropa poŝtmarka bloko. Filatelistoj nomas ĝin "la plej bona poŝtmarko de Ĉinio".

Tiam s-ro Villard kaŝis ĝin. En 1904 li testamentis ĝin al sia edzino. 20 jarojn poste, la poŝtmarko diskoniĝis kaj altiris la atenton de s-ro Zhou Jinjue, fama filatelisto en la 20-aj jaroj. Li rompis al si la kapon por akiri la poŝtmarkon. Finfine li sukcesis aĉeti per 1 700 dolaroj kaj kreis plej altan ĉinan rekordon pri poŝtmarka negoco. Pro tio li fariĝis "reĝo de ĉinaj filatelistoj".

Ĉe la fino de la 40-aj jaroj, pro maljuneco kaj malsano s-ro Zhou perdis la intereson pri filatelo kaj vendis la poŝtmarkon al filatelisto Guo Zhifang kontraŭ 21 000 dolaroj. Poste s-ro Guo loĝis en Usono kaj ankaŭ li malsaniĝis. Li forvendis ĉiujn siajn poŝtmarkojn escepte de la bloko kaj donis ĝin al sia edzino Liu Zhaoshan, ke ŝi konservu la blokon kaj ne vendu ĝin al fremdulo. Ŝi rifuzis ĉiujn aĉetantojn el aliaj landoj.

En 1982 s-ro Lam Manyin aĉetis ĝin per 0.3 miliono da dolaroj kaj portis ĝin al Ĉinio. Li fariĝis nova reĝo de ĉinaj filatelistoj. ■

● Laŭ statistiko de la Ĝenerala Dogana Administracio de Ĉinio la totala import-eksporta valoro de Ĉinio en 1999 estis 360.7 miliardoj da usonaj dolaroj, je 11.3% pli multe ol tiu en 1998. En 1999 la totala valoro de la eksportaĵoj estis 194.9 miliardoj da usonaj dolaroj kaj tiu de la importaĵoj — 165.8 miliardoj da usonaj dolaroj. La favorsaldo en 1999 atingis 29.1 miliardojn da usonaj dolaroj kaj en tiu jaro la valoro de la importaĵoj kaj eksportaĵoj ambaŭ kreis novan rekordon.

● En 1999 la totala enlanda produktovaloru de Tibeto atingis 10.33 miliardojn da juanoj, je 9.1% pli multe ol tiu en 1998. (Ĉ. 8.3 juanoj egalas al unu usona dolaro.) Ĝi kreskis pli rapide ol la meznombra

rapideco de tiu de la tuta lando en sinsekvaj 6 jaroj. En 1999 la pokapa enspezo de la kamparanoj kaj paŝtistoj de Tibeto atingis 1 250 juanojn.

● La trunka tubaro por konduki naturan gason de okcidente orienten, longa 4 212 km., estas en streĉa preparado inter Xinĵiang kaj Ŝanhajo. Tio estas grava konstru-projekto, kies investo estos eble malpli granda nur ol tiu de la pivota akvomastroma konstruo ĉe la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero.

● Ĉinio ĉesis kulturi en 1999 ĉ. 400 000 hektarojn da agroj por cedi ilin al lago, arbaroj kaj herbejoj cele plibonigi la ekologian medion.

● La 26-an de januaro 2000 la sinkrona telekomunika satelito Zhongxing-22, 2.3 tunojn peza, estis lanĉita kaj eniris en la difinitan orbiton. Tio estis la 60-a flugo, por kiu oni uzis unu el la serio de la transportaj raketoj

Changzheng, kaj ankaŭ la 18-a sukceso ekde oktobro 1996.

● En la vintro de 1999 la Arta Festivalo de Glaciaj Skulptaĵoj okazinta en Longqingxia, Yanqing-gubernio, Pekino, altiris al si multe da rigardantoj.

La festivalo karakteriziĝis per



Glaciaj skulptaĵoj en Longqingxia

kombino de la glaciaj kaj koloraj lanternoj. La historiaj restaĵoj, belaj pejzaĝoj, mitoj kaj legendoj, homoj, birdoj kaj bestoj faritaj el natura glacio formis fabelan landon kaj ravis ĉiujn rigardantojn.

● Antaŭ nelonge ĉinaj sciencistoj malkovris la heredan ĉifron de termofilika bakterio (*thermophilic bacteria*).

La esploro pri mikroba genaro, bezonanta malmulte da investo kaj rapide profitodona, estas sur fronta kampo de la genara esploro en la mondo. Ĉinio, geografie komplika, havas abundon da mikrobaj fontoj. La esploro pri tiuj mikroboj estas grava ĉu por esplori la biologian evoluon ĉu por esplori la konsiston kaj funkcion de proteino kaj enzimoj. Oni diris, ke nun en la mondo jam malkovriĝis la hereda ĉifro de 26 mikroboj.

● Ĉinaj scienc-esploristoj

malkovris, ke la ĉin-medicina kontraŭkancera injektaĵo Kanglaite farita de Ĉinio estas efika por malhelpi kreskon de tumoraj angioj kaj en la provado oni preskaŭ ne trovis novajn angiojn kaj la malnovaj angioj rapide kolapsiĝis. La malkovro montras, ke la tradiciaj ĉinaj medikamentoj

havas riĉan latentan forton por disvolvo. Nun en Ĉinio pli ol 3 000 hospitaloj uzas tiun medikamenton.

● En Yunnan-provinco, kie sukcese okazis la Monda Hortikultura Foiro en 1999, estas la Kunming-a Internacia Turisma Festivalo ĉi-jare, kiu konigos al la tuta mondo la naturajn pejzaĝojn kaj nacian kulturon de la provinco.

La ĉefa kunvenejo estas en Kunming kaj la malĉefaj en Dali, Lijiang, Xishuangbanna, Ŝtona Arbaro kaj aliaj lokoj. Oni okazigos ankaŭ la Torĉan Karnavalon en la Ŝtona Arbaro, Ekspozicion de Nacimalplimultaj Vestoj, Internacian Ekspozicion de Jadaĵoj, Internacian Invitan Turniron de Golfludo por Internacie Famaj Personoj, Aŭtomobila Ralio inter Bankoko kaj Kunming kaj Internacian Artan Festivalon, Kunming, Ĉinio.

KION PLEJ MULTE ATENTAS LA URBANOJ?

Antaŭ nelonge iu gazetara institucio de Pekino faris enketon en 15 grandaj kaj mezgrandaj urboj de Ĉinio kaj informiĝis, ke la komune atentataj problemoj de la demanditoj en tiuj urboj estas la atmosfera kaj akva polucioj kaj urbatrafika malfacilo. Krome, multaj urbestroj prenas la vivgarantion de la malmulte enspezantaj urboj kiel la trian problemon, dum la urboj prenas la socian sekurecon kiel unu el la plej atentataj problemoj.

Kial la urboj rigardas la atmosferan kaj akvan poluciojn kiel unu el la plej seriozaj problemoj? Ni prenu Pekinon kiel ekzemplon. En la lastaj jaroj en neniu semajno la aera kvalito atingis la unuan gradon, sed en pli ol duonjaro la aera kvalito superis la kvaran gradon. Tio montras, ke nur en malmultaj tagoj la urboj havas freŝan kaj puran aeron.

Kvankam en tiu enketado multaj homoj opinias, ke ekde la komenco de la 90-aj jaroj iom mildiĝis la trafika malfacilo, tamen la trafika ŝtopiĝo en la pint-horoj restas serioza, pro tio la urboj rigardas la trafikan malfacilon kiel unu el la tri problemoj multe atentataj.

Krom la polucio kaŭzita de sulfura dioksido kaj pulvoro ellasitaj de industriaj entreprenoj, familia hejtado kaj aŭtomobila vostgaso, ankaŭ la socia sekureco multe zorgigas la urbojn.

NOVA ASERTO PRI SOVAĜA HOMO

De multaj jaroj oni havas diversajn argumentojn pri sovaĝaj homoj en la rezervejo Shennongjia. Por malkovri tiun misteron, sciencistoj kaj aventuruloj faris multe da esploroj, tamen ne akiris kontentigan respondon ĝis hodiaŭ.

De post 1996 geografia prof. Huang Jianmin trifoje iris al la primitivaj arbaroj de Shennongjia. En vastaj arbaroj li pririgardis kavernon de la tiel nomataj sovaĝaj homoj, iliajn fekojn kaj harojn, vizitis multajn tieajn kamparanojn kaj arbarajn administrantojn kaj faris esplorojn pri la tieaj klimato, geologio, geomorfologio, vivmedio kaj konsisto de la nutraĵ-ĉeno kaj akiris multe da fidindaj materialoj. Post tio li venis al la konkludo, ke en Shennongjia ne estas sovaĝa homo.

Li faris tiun konkludon ĉefe pro la jenaj kialoj: Unue, tie ne estas bazaj vivkondiĉoj por la sovaĝaj homoj. Oni diris, ke la sovaĝaj homoj ĝenerale vivas en pinglarbaroj, tamen la situo de Shennongjia estas alta sen manĝaĵoj por la sovaĝaj homoj. Due, tie ne estas kondiĉoj por la sovaĝaj homoj generi, ĉar tie mankas grupo da tiaj homoj. Trie, en la nuna epoko neniu speco da bestoj povas evolui en homojn nek la homoj degeneri en bestojn.

Prof. Huang faris sciencon ekzamenon pri fekoj kaj haroj de la tiel nomataj sovaĝaj homoj kaj konkludis, ke ili estas postlasitaj de bestoj.

FURORAS TURISMADO AL QOMOLANGMA

Antaŭ ol eniri en la rezervejon de Qomolangma, Tibeto, sudokcidenta Ĉinio, ĉiuj turistoj ĉu ĉinaj ĉu ali-landaj ricevas apartan paspermeson, sur kies dorso estas presitaj jenaj vortoj: "En la rezervejo iru ireblan vojon, ne tretu la freŝajn vegetaĵojn nek kolektu vegetaĵojn. Portu ĉiun vian rubon kaj ĵetu ĝin en difinitan rubujon."

La rezervejo de Qomolangma kovras areon de 35 mil kvadrataj metroj. UN prenas ĝin kiel unu el la 50 plej bonaj regionoj por disvolviĝo. La tiea vojaĝo estas malfacila. Oni devas havi premarmiton kaj ŝpruclampon.

Por atingi la stabejon de Qomolangma oni devas tranokti en Rongbu-templo, la plej alta en la mondo. Ĝi situas en la loko 5 100 m. alta super la marnivelo. Tie estas tibet-stila hotelo el kelke da ŝtonaj domoj simple meblitaj. Ĉirkaŭ la domoj vidiĝas centoj da sovaĝaj rokkolomboj. Turistoj ofte nutras ilin por distriĝo.

Vojaĝi al la monda tegmento estas revo de multaj turistoj. En la lastaj jaroj pli kaj pli da turistoj vojaĝis tien por sperti la ĉarmon de ekologia turismo.

HUZHOU-A PENIKO

En Ĉinio peniko, inko, papero kaj inkfrotujo estas nomataj kvar trezoroj en la studĉambro. Tiuj kvar objektoj havas multajn markojn pro malsamaj produktaĵoj. El ili

la plej famaj penikoj estas produktitaj en Huzhou de Zhejiang-provinco.

La ĉinaj kaligrafaj penikoj kaj pentraĵoj ne povas esti farataj sen peniko kaj plie por fari ilin estas bezonataj malsamaj penikoj.

En la urbeto Shanlian de Huzhou estas fabriko de penikoj. En ĝia eksponejo vidiĝas 300 specoj da penikoj, el kiuj

la plej granda el ĉevalaj kolharoj estas 112 cm. longa kaj 13 kg. peza kaj la plej malgranda havas hartufon nur 0.9 cm. longan. Tie estas ankaŭ granda peniko el ŝafharoj longaj kaj fajnaj, kies bastoneto estas el nigra bovkorno. Ĝi longas 15 cm. kun hartufo diafana kaj pika. Ĝi estas distingiĝa speco de la Huzhou-aj penikoj.

Fari penikon estas laboro

ŝajne simpla, sed sufiĉe rafinita, kio bezonas pli ol 100 procedojn.

La Huzhou-aj penikoj havas tipajn naciajn trajtojn. Ĝenerale iliaj bastonetoj estas faritaj el valora bambuo kaj la altklasaj el eburo, bovkorno, palisandro kaj klozoneo. La skatolo de peniko estas kovrita per luksa silkaĵo ene kaj ekstere.



Huzhou-aj penikoj

La plej juna granda majstro de ŝako en la mondo

Li fariĝis el nacia majstro internacia majstro kaj eĉ granda majstro en nur malpli ol unu jaro

de PING HUA

“Li tiel lertis en la fina stadio, ke mi tute ne sciis kiel mi estis venkita.”

“Mi partoprenis multajn konkursojn kaj renkontis multajn rivalojn, tamen mi ne antaŭvidis, ke li estas tiel timiga.”

Tiujn vortojn diris famaj internaciaj majstroj de ŝako el Hungario kaj Hispanio. La menciita “timiga homo” estas Bu Xiangzhi (Bu Ŝjangĝi), 14-jara knabo el la ĉina urbo Qingdao.

La 23-a de oktobro 1999 estis neordinara por Bu Xiangzhi. Tiun tagon, akirinte normajn poentojn, li fariĝis granda majstro de ŝako, la plej juna en la mondo; tiun tagon li ĝuste estis en sia aĝo de 13 jaroj, 10 monatoj kaj 13 tagoj. Antaŭe ukraina ŝakisto konservis la rekordon de plej juna granda majstro, ricevinte la titolon en sia aĝo de 14 jaroj kaj 17 tagoj. Bu Xiangzhi surprizis nin ankaŭ pro tio, ke li fariĝis el nacia majstro internacia majstro kaj eĉ granda majstro en nur malpli ol unu jaro. Laŭdire, tia fenomeno neniam aperis en la 500-jara historio de ŝako.

Antaŭ ol unufoje kontakti ŝakon en la aĝo de 6.5 jaroj, Bu Xiangzhi ŝatis karikatursajn bildojn kaj filmojn, same kiel siaj samaĝuloj. Estas ŝako, kiu vekis en li pasion kaj batalvolon. Dank’ al sia talento kaj diligenteco, li rapide progresis en la ŝakludo. Unu jaron post sia lernado de ŝakludo, li unufoje partoprenis knaban konkurson de ŝako en

Qingdao kaj gajnis la unuan lokon en la grupo de elementlernejoj. En 1996 li, 9-jara, fariĝis ĉampiono de la tutlanda knaba konkurso de ŝako. Dum oktobro kaj novembro 1999 li partoprenis la mondan knaban laŭaĝan ĉampionecon konkurson de ŝako en Hispanio kaj gajnis la ĉampionecon de la grupo de 14-jaruloj. Tiam li estis malpli ol 13-jara.

Ŝajne Bu Xiangzhi estas pli matura ol kiom lia aĝo montras. Tion vidigas ne lia alto de 1.80 metroj, sed liaj prudentaj agoj kaj paroloj. Li ne kaŝas sian adoron al Bobby Fischer, iama mondĉampiono, kaj ankaŭ sian fortan deziron fariĝi mondĉampiono. Li klare scias, ke la nuna mondĉampiono Garo Kasparov estas pli aĝa ol li je 22 jaroj. Li povas diri al vi, ke li naskiĝis unu monaton post kiam Kasparov unufoje gajnis la mondĉampionecon. Tamen demandite, kiel taksu la ŝakludon de Kasparov, li respondis: “Mi ne volas paroli pri tio.”

Pri la sukceso fruiĝi je 3 monatoj la rekordon por esti la plej juna granda majstro, Bu Xiangzhi estis ĝoja, eĉ iom fiera. Sed li opinias, ke la rekordo baldaŭ rompiĝos, ĉar nuntempe 3-jaraj infanoj jam komencas lerni ŝakludon (pli frue ne eble), post lernado kaj trejnado de 7 jaroj (evidente li konsideris laŭ sia



Bu Xiangzhi

sperto), ili probable fariĝos grandaj majstroj en la 11-jara aĝo. Ĉu venos tago, kiam iu genia knabo realigos la aŭdacan profetaĵon de tiu mirinfano?

La progreson de ĉiu ajn genio oni kompreneble ŝuldas ankaŭ al la helpo de sennombraj homoj. Bu Xiangzhi diris, ke plej multe helpis lin lia trejnisto Ji Yunqi (Ĝji Junĉji), kiu instruis lin ne nur pri ŝakludo, sed ankaŭ multe pri vivoprincipo. Estas la patro, kiu akompanis lin unufoje aliloken por turniro. Por prizorgi lin kaj akompani lin por turniroj tie kaj tie, la patrino ekzigis. Ĉiujare la redakcio de “Qingdao-a Ĵurnalo” monhelpis multesperigajn ŝakistojn, kia Bu Xiangzhi, por trejnado kaj turniro. Nelonge antaŭe, Ye Jiangchuan (Je Ĝjangĉuan), trejnisto de granda majstro Xie Jun (Ŝje Ĝjun), jam disĉipligis Bu Xiangzhi. Li diris, ke li laŭeble helpos ne nur Xie Jun, sed ankaŭ Bu Xiangzhi, por ke la lasta brilu kiel eble plej baldaŭ en la monda ŝakista rondo.

Ni atendas tiun tagon. ■

DU FABLOJ

Sekreto de kurbiĝo de salikoko

ANTAŬE la salikoko estis bela kaj alta. Ĝi volvis sin per kristala kiraso kaj surkape troviĝis paro da tentakloj. Ĉiutage ĝi gardis aliajn. La akva herbo kaj lotuso ŝatis ĝin. La akva insekto kaj limako volis amikiĝi kun ĝi, eĉ la lumbriko ĉe bordo donacis manĝaĵon al ĝi. Iom post iom la

salikoko fieris. Ĝi pensis: "Kial mi tiel fidelas al ili? Mi ne volas plu gardi ilin, sed dormi en kvieta loko." Sekve ĝi ekserĉis lokon. Amikoj opiniis, ke ĝi havas novan informon por diri al ili. Ili bonvenigis ĝin. La salikoko estis indiferenta al ili. Fine ĝi trovis ĉe la bordo truon, en kiu troviĝas mola koto. Ĝi ekdormis dolĉe.

Kvankam la truo estis malgranda kaj ĝi devis kurbigi sin, tamen neniu ĝenis ĝin. Post longa vintro venis printempo. Ĝi vekigis kaj eliris el la truo. La akva herbo, lotuso, limako kaj akva insekto miris pro ĝia kurbiĝo. Ĝi tuj naĝis en puran akvon kaj pentis: "Kiel malbela mi estas! Tio estas puno al mallaboremo." ■

Pokalo de limako

ANTAŬ longe limako estis insekto kun 6 longaj kruroj kaj paro daflugiloj. Ĝi kapablis ne nur kuri, sed ankaŭ flugi.

Iutage okazis sportkunveno de insektoj. Oni petis vespon esti juĝanto. Post fajfo komenciĝis flugkonkurso. La insektoj rapide svingis siajn flugilojn kaj flugis antaŭen. La limako estis antaŭe, sekvis la abelo, kaj postiĝis la papilio. Fine la limako fariĝis ĉampiono.

La amikoj gratulis ĝin kaj kantis al ĝi, kiu tenis grandan pokalon en la mano.

La limako estis memkontenta. Por paradi per sia pokalo, ĝi ĉiam portis ĝin en la mano. Pro la grandeco kaj pezeco de la pokalo ĝi ne povis flugi. Venis al ĝi ideo: porti la pokalon surdorse kaj malrapide rampi.


Dum dormado ĝi ankaŭ timis, ke oni ŝtelos la pokalon. Fine ĝi

elpensis, ke ĝi kaŝu sin en la pokalo por ne disiĝi de ĝi.

Multaj jaroj pasis. La limako iris longan vojon kaj fiksas sian korpon en la pokalo. Ĝi povis

apenaŭ elstarigi sian kapon kun tentakloj kaj duonon de sia korpo.

Poste ĝi ne povis flugi nek kuri kaj nur malrapide rampi kun peza pokalo. ■



Lotus-lanterno

Temas pri mito kiel Chenxiang savis sian patriron.

Diino Sanshengmu enamiĝis al Liu Yanchang, klerulo en la surtera mondo. Ŝia frato, dio Erlang, firme tion malaprobis. Ŝi senhezite descendis al la homa mondo por ĝui feliĉan vivon. Dio Erlang venis kapti ŝin, sed li retiriĝis antaŭ la magia forto de la lotus-lanterno de Sanshengmu. La lanterno estas magia kaj povas venki la fiulojn kaj doni feliĉon al la bonkoruloj.

Poste Liu Yanchang mortis kaj Sanshengmu sola flegis la filon Chenxiang.

Foje Chenxiang senatente tuŝis la lotus-lanternon, kaj ĝi ekbrilis. Dio Erlang vidis la ekbrilon kaj sendis forŝteli Chenxiang.

Diino Sanshengmu iris al dio Erlang por repreni de li sian filon. Sed Erlang rifuzis redoni la infanon kaj forrabis la lanternon. Krome li metis Sanshengmu sub Huashan-monton.

Chenxiang en la ĉiela palaco volis savi sian patriron kaj la tera dio diris al li, ke li sin turnu al simioreĝo Sun Wukong. Dank' al helpo de simieto Chenxiang reakiris la lotus-lanternon

kaj serĉadis Sun Wukong en la surtera mondo. Post kelke da jaroj elkreskis Chenxiang. Iom post iom li komprenis, ke oni devas fari ĉion per si mem. Sun Wukong donacis al li blankan ĉevalon kaj diris, ke la magia hakilo povos helpi lin savi la patriron.

En la brilo de la lotus-lanterno, Chenxiang kuraĝe batalis kontraŭ dio Erlang. Fine li trahakis la monton kaj savis sian patriron.

La bildlibro estas adaptaĵo de movbilda filmo kun la sama titolo. Simplaj tekstoj por la belaj bildoj estas facile legeblaj.

112 p. 165X225 mm.
Prezo: 8.00 USD
Sendokosto: 3.00 USD
Mendu ĉe:

- Distribua Fako de EPC
- Libroservo de UEA
- Nia peranto en via lando



Kontribuaĵoj petataj por la konkurso “50 jaroj por EPC”

50 jaroj por

Esperanto

Paco

Ĉinio

En majo 2000 la redakcio de “El Popola Ĉinio” festos sian 50-jaran jubileon. En duon-jarcento la revuo EPC, la E-movado en Ĉinio kaj la tuta mondo spertis grandajn ŝanĝiĝojn. Vi, spertanto de la 50 jaroj, certe havas ion por verki, por diri al la aliaj. Pro tio ni lanĉos konkurson “50 jaroj por EPC” kaj sincere petas vian kontribuaĵon.

Vi povas verki kun tre ampleksa temo, rilate al EPC — Esperanto, Paco kaj Ĉinio. Ekz. viaj esperantista sperto, opinio pri E-movado kaj paco, amikaj kontaktoj kun alilandanoj, impreso pri kaj rilato kun Ĉinio kaj la revuo EPC...

Viaj kontribuaĵoj povas esti en ajna stilo kaj ajna formo. Estas tre bonvenaj koncernaj

fotoj kaj portreto de la aŭtoro por ilustrati la artikolon.

La kontribuaĵoj venu al nia redakcio antaŭ la 30-a de aprilo 2000.

Ni aljuĝos premiojn al la kontribuintoj. La premiitoj ricevos ĉinajn metiartaĵojn, E-librojn kaj unu-jaran abonon de EPC. Ĉiu kontribuinto ricevos donaceton.

Ni publikigos elstarajn kontribuaĵojn en la rubriko “50 jaroj — EPC”. La rezulto de la konkurso legeblas en la julia numero de EPC 2000. Dum la 85-a UK en Tel Aviv de Israelo ni anoncos la rezulton kaj disdonos la premiojn.

La Red.

ĈINAJ METIARTAĴOJ

Jada bovlo

La blanka jada bovlo havas oran kovrilon duonsferan kaj pli larĝan ol la bovlo. Kun ĉizita desegno de petaloj kaj tenilo en formo de transformita lotusfloro, la kovrilo estis inkrustita per turkiso. La alta piedo estis ĉizita je desegno de lotusfloro kaj inkrustita per turkiso. La subportilo de la bovlo havas orajn bidojn ĉirkaŭ la rando kaj estas inkrustita per turkisaj umefloroj. La rando de la subportilo estis ĉizita per desegno de pasifloroj. La blanka jada bovlo havas tibetlingvajn vortojn interne ĉe la rando. En ĝia fundo estis gravuritaj ideogramoj "Farita en la regperiodo de Qianlong" (Qing-dinastia imperiestro, 1736-1795 sur la trono). La artaĵo altas 26 cm. kaj ĝia diametro estas 14.5 cm. Ĝi estas konservata en la Muzeo de Imperiestra Palaco en Pekino de Ĉinio.





Banjano êe Lijiang-rivero

Foto de WANG TIANXING

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》二〇〇〇年第四期
(本刊代号 二一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2